


2/2020

Marto
Aprilo

ISSN 0032-2431

Pola Esperantisto

Revuo de Pola Esperanto-Asocio



- ★ Transponta Esperanto-Kongreso en 2021
- ★ Forgesita fluganta Ludoviko Zamenhof
- ★ La Esperanto-movado meze de pandemio

Pola Esperantisto

Dumonata revuo de Pola Esperanto-Asocio. Fondita en 1908.

Eldonanto

Pola Esperanto-Asocio
ul. Gen. W. Andersa 37/59 a
00-159 Warszawa
<http://www.esperanto.pl>

Ĉefredaktoro

Robert Kamiński, rk-lodz@wp.pl

Kunlaboro

Teresa Nemere, Roman Dobrzyński,
Jerzy Dryja, Magdalena Tatara,
Andrzej Sochacki, Adam Wilkus

ABONOJ

La abono por 2020 - por 6 numeroj (papera):

Pollando - 50 zlotoj

eksterlando - 20 euroj

Cifereca (pdf)

Pollando - 25 zlotoj

eksterlando - 10 eŭroj

Pagendaj al la konto:

PL 37 2130 0004 2001 0558 6110 0002
swift INGBPPLPW

La mendon provizu per informo, al kiu
adreso estu sendata la revuo.

ATENTO

Abonoj per eŭroj validas post
aldono de bankaj kostoj.

Polan Esperantiston eblas aboni per
Konto de PEA en UEA: peaa-v.

Detaloj troviĝas ĉe:

<https://uea.org/alighoj/pagmanieroj>
kaj <https://uea.org/alighoj/spagilo>

Presejo

BŁĘKITNE STUDIO

ul. Chopina 6, 44-100 Gliwice

Fronta kovrilpaĝo - Zbigniew Kornicki el Poznań

Estraro de PEA

Robert Kamiński - prezidanto
Agnieszka Mozer - vicprezidanto
Zofia Śmistek- sekretario
Alina Mozer - kasisto
Marek Mazurkiewicz - estrarano

Ĉefdelegito de UEA

Stanisław Mandrak:
stanislaw.mandrak@gmail.com

Peranto de UEA

Jan Skonieczka: jaskon@op.pl,

Pri la skribitaj artikoloj
respondecas
la aŭtoroj mem.
Ricevitajn manuskriptojn
oni ne resendadas.
La redakcio rezervas al si
la rajton mallongigi
kaj korekti la tekstojn.
Reprezo kaj tradukoj nur
kun indiko pri la fonto



Pola Esperanto-Asocio
Polski Związek Esperantystów

Enhavo

Redaktoraj vortoj	2
PEA-estraro informas	
<i>PEA-estraro</i> , Germana - Pola E-Kongreso 2020 - Komunikaĵo n-ro 1 de PEA	3
Eventoj	
<i>Adam Wilkus</i> , Czantoria Wielka 2019	4
<i>Paŭlo S. Viana el Brazilo</i> , La Esperanto-movado meze de pandemio	5
<i>Robert Kamiński</i> , Viruso Covid-19 en nia lando	7
Mojose	
<i>www.pej.pl</i> , Nuligita renkontiĝo en Triurbo, Disaŭdigo kun Tobiasz	9
Raportoj, rakontoj	
<i>Robert Kamiński</i> , Forgesita fluganta Ludoviko Zamenhof	9
<i>Aleksander Zdechlik</i> , Ne ekzistas malbono, kiu ne kaŭzus bonon	12
Pri kio ni aŭdas	
<i>BES</i> , Literatura Konkurso 2020 - „Pandemio – neĉiutaga ĉiutageco”	14
<i>uea.org</i> , Virtualaj eventoj anstataŭ la malferma tago kaj la UK en 2020	14
<i>Robert Kamiński</i> , Historio de rubaĵoj (dua parto)	16
Vizitindaj lokoj	
<i>Robert Kamiński</i> , Salmineja kastelo en Wieliczka	17
Homoj	
<i>Roman Dobrzyński</i> , Erika	21
<i>Paweł Dzienis</i> , Pri Primaso de la Jarmilo en la tempo de lia beatigo	26
Lingvosciencia angulo..	
Plena Manlibro de E-a Gramatiko, Rolvortetoj “ <i>De</i> ” - <i>De</i> , rilate al aga O-vorto	29
Literaturaĵoj	
<i>Cecylia Hlebowicz</i> , Anna en Afriko	31
<i>Roman Dobrzyński</i> , Epigramoj	35
Saĝulaj pensoj	
<i>Andreo Bach</i> , Nekredeble, ni povas funkcii sen tio	37
Leterkesto	
<i>Elżbieta Karczewska</i> , „Esperanto Libraro” fermita	38
<i>Jomart Amzayev</i> , Komune kanti!	38
<i>Katalin Kováts</i> , Pranepino de Ludoviko Zamenhof malsana	39
<i>Przemysław Wierzbowski</i> , SAT-kongreso 2020 estos enreta	39
Kalendaro	40
Gazetaro pri E-movado	
<i>Paweł Dzienis</i> , Pri Esperanto en la 1-a programo de Pola Radio	42
„Esperanto, kiu estas la diferenco inter interkonsento kaj kompreno”	43
Oni eldonis	
<i>Przemysław Wierzbowski</i> , Nova romano, eldonita en Bjalistoko	44
Forpasis	
<i>Zofia Soroka</i> , Erika Dobrzyński, Irena Szanser	45
El fotogalerio de Andrzej Sochacki	
<i>Andrzej Sochacki</i> , Beskidmontara Turisma Esperanto-Renkontiĝo 22-26.6.1988	46

Redaktoraj vortoj

Jam kuras la jaro 2020 kaj, neatendite, la mondo estas endanĝerita de la nova, ĝis nun nekonatala epidemio, epidemio de la viruso Covid 19, populare nomata kronviruso. Unuafoje dum nia vivo epidemio havas tiel grandan forton, ke ĝi furiozas en ĉiuj landoj en la mondo, do fakte ĝi estas pandemio. Malgaraŭ tio, ke la pandemio daŭras nur 2 monatojn, jam nun ĝi kaŭzis en nia vivo grandajn ŝanĝojn. En la nunaj cirkonstancoj, ni ĉiuj suferas diversajn limigojn, malpermesojn kaj devigojn. La ŝanĝoj rilatas al ĉiuj niaj vivokampoj. Ekzemple: dum la privata ĉiutago, inter aliaj malfacilaĵoj, multaj homoj devas pasigi en siaj, ofte malgrandaj loĝejoj, tutan tagon kune: infanoj ne vizitas lernejojn kaj devas lerni helpe de interreto, multaj plenkreskuloj devas simile labori hejme, do ofte mankas, ne nur komputiloj, sed simple loko, trankvilo, silento kaj cedas nervoj. Novaj kondiĉoj komplikas ankaŭ la publikan vivon; jam nun okazas laborproblemoj, ĉesas funkcii restoracioj, turismo, ne povas okazi sportaj kaj kulturaranĝoj.

La samaj cirkonstancoj kaŭzas malfacilaĵojn ankaŭ por nia esperantista vivo. Ĉijare oni devas rezigni de la grandaj, internaciaj E aranĝoj kiel UK, ladaj kongresoj, diversaj fakaj konferencoj. Eĉ la ĉiutagaj, klubaj renkontiĝoj ne povas okazi.

En tiu ĉi numero de PE, jam tradicie, ni publikigas kalendaron de la planitaj, diversaj landaj kaj eksterlandaj E aranĝoj, kvankam jam oni scias, ke ili ne povos okazi en la planita tempo.

La kalendaro restu dokumento por la historio de nia movado, atesto, ke esperantistoj planis, agis eĉ dum la malfacila periodo.

La pandemio atingis ĉiujn landojn kaj ĉie kaŭzas problemojn, sed, kompreneble, la situacioj estas diversaj, depende de la ekonomiaj kaj politikaj cirkonstancoj.

Ni, en Pollando, feliĉe, ne suferas grandajn, ĉiutagajn problemojn. Vendejoj estas malfermitaj, ne mankas manĝaĵoj, funkcias poŝto kaj telefonoj. Tamen, multaj homoj restas solaj, izolitaj, multaj maljunuloj kaj malsanuloj bezonas helpon. La samo rilatas al niaj polaj esperantistoj. Pro tio ni proponas: ni formu kaj ĝuu "unu rondon familian" ne nur dum la normala, bona tempo. Ni nun intresigu, pri niaj samideanoj: ni skribu leterojn, telefonu, ŝanĝu travivaĵojn, eble eĉ rakontu spritaĵojn, por variigi tempon, por doni amikan signon. Meritas ankaŭ uzi la tempon por legi (nun

mi pensas pri E literaturo) kaj strebi plibonigi nivelon de la lingvokono. Kompreneble, se estas necesa konkreta halpo, ni helpu aŭ organizu la helpon por senfortuloj. Simile ni povas agi rilate al la ekstrandaj samideanoj. Ni pruvu nun, ke la internacia lingvo vere estas lingvo de interkompreniĝo kaj helpo.

Sed estas landoj, kie homoj devas nun barakti kun multaj, veraj problemoj. Mi mem ricevas informojn de esperantistoj el Afriko, kie ili suferas multajn malfacilaĵajn, eĉ ĉiutagan malsaton. Mi provas trovi la vojon, kiu ebligus helpon. En tiaj momentoj revenas la rememoro pri tio, kiom multe eksterlandaj esperantistoj helpis al polaj samideanoj, dum la krizaj jaroj en Pollando. Nun la helpvojo ne estas facila. Pro tio mi kuraĝas prezenti la alvokon: ni ĉiuj serĉu la vojon por helpi esperantistojn en la landoj, kie estas danĝero por ilia vivo, precipe nun, dum la pandemio kaj ni interŝanĝu niajn spertojn, ankaŭ sur la paĝoj de Pola Esperantisto.

La plej grava estas vivo. Nun ni devas helpi. Poste ni pensos pri kongresoj, renkontiĝoj kaj amuzaj kunvenoj.

Robert Kamiński

PEA-estraro informas

Transponta Esperanto-Kongreso
germana - pola - fervojista



Frankfurt (O) / Słubice
29-a de Majo – 5-a de Junio 2020



PEA-estraro

Germana-Pola
Esperanto-Kongreso

Transponta Esperanto-Kongreso
germana - pola - fervojista



Frankfurt (O) / Słubice
21-a – 28-a de Majo 2021



Komunikaĵo n-ro 1 de PEA – 2020.04.19.

Estimataj Samideanoj!

Post longa diskuto, Pola Esperanto-Asocio kaj Germana Esperanto-Asocio, pro pandemio de kronviruso, decidis ŝanĝi daton de la planita (29-a de majo - 5-a de junio 2020) Transponta Esperanto-Kongreso en Frankfurt – Słubice kaj okazigi ĝin venontjare.

La granda parto de la preparlaboro jam estas farita. Ni jam havas ideon, kion ni volas fari kaj la kondiĉoj por la organizado estas certigitaj. *Collegium Polonicum* en Słubice kaj *Universitato Viadrina* en Frankfurto konfirmis akcepton de la Kongreso en 2021.

La preciza dato de la venontjara Kongreso ankoraŭ ne estas decidita. Verŝajne la Kongreso okazos inter la 21-a kaj 24-a de majo 2021; la sekvaj

tagoj, ĝis la 27-a, estas planitaj por la kongreso de fervojistoj). Aliĝkoto por personoj el Pollando ne kreskos kaj ne superos pli ol 45 € sendepende de la venontjara valoro de eŭro). Pro tio, PEA proponas al aliĝintoj lasi aliĝkoton en PEA-bankokonto. Tiuj, kiuj volos, povas ricevi la enpagitan monon.

La laŭstatuta Ĝenerala Kunsido de PEA, pro la pandemio, estas prokrastita je tri monatoj kaj, laŭ leĝo, ĝi devas okazi ĝis la fino de septembro. Pri la kunsido ni informos en la aparta komunikaĵo.

Nome Ĉefa Estraro de PEA

Robert Kamiński, prezidanto

Kongresa retejo: <https://www.esperanto.de/eo/enhavo/programo-7>

Eventoj

Pro manko de Esperantaj eventoj pro la virusa pandemio en la komenco de 2020, ni prezentas raporton de Adam Wilkus pri la tradicia Esperanta renkontiĝo sur la monto Czantoria Wielka (Ĉantorio la Granda), kiun ni ne sukcesis prezenti ĝustatempe. *Redakcio*

Adam Wilkus

Czantoria Wielka 2019

Dum la tria dimanĉo de junio 2019 okazis tradicia renkontiĝo de polaj, ĉeĥaj kaj slovakaj esperantistoj sur la pinto de Czantoria Wielka, en la montaro Silezia Beskido. Venis sume ĉirkaŭ dudek samideanoj.

Ĉi-foje, unu tagon antaŭ la montara renkontiĝo, plejparto de slovakaj kaj ĉeĥaj partoprenintoj, invititaj de la pola samideano Aleksander Zdechlik, vizitis la minejgalerion „Luiza”, la subteran muzeon de la karbominejo „Guido” en Zabrze kaj la faman historian radiostacion en Gliwice. Espereble venontjare ĉeĥaj aŭ slovakaj samideanoj organizos similan programeron ĉe sia flanko de la landlimo, antaŭ la renkonto en la montaro, kaj sciigos ĉiujn pri tio pli frue.

Dimanĉe, preskaŭ ĉiuj partoprenintoj venis per telfero al la pinto kaj renkontiĝis kun tiuj, kiuj venis perpiede, en la ĉeĥa gastejo *Velká Čantoryje*. Kvankam, laŭ veterprognozo, oni atendis tempeston, fakte estis bela, sunplena vetero, kun nur eta kaj mallonga pluveto posttagmeze. La

partoprenintoj babilis, bierumis aŭ teumis kaj gustumis tipe ĉeĥan manĝaĵon, partoprenis en la konkurso kun premioj pri voĉoj de birdoj kaj ĝuis la ludon, kiu ekzercas memoron. La venkintoj ricevis kelkajn bele ilustritajn E-kalendarojn aŭ lastatempe eldonitajn kompaktdiskojn de la ensemblo „Kajto”.

La partoprenintoj faris komunan foton kaj agrable ripozis spirante la




freŝan, montaran aeron, ĝuante la ĉirkaŭan verdaĵon kaj aŭskultante birdan kantadon en naturo. Kelkaj el la partoprenintoj supreniris la rigardan turon por ĝui la belan panoramon. Denove okazis sukcesa E-renkontiĝo en la montaro.

Paŭlo S. Viana el Brazilo

La Esperanto-movado meze de pandemio

Meze de la terura pandemio, kiu cunamas la mondon en komenco de la jaro 2020, certe unu demando okupas la menson de ĉiuj homoj, kiuj amas nian komunan lingvon Esperanto. La demando estas: kiel efikos la viruso rilate nian movadon?



La unua penso estas maltrankviliga. Nia kulturmovado ne estas tiel forta kiel ni volus kaj ĝia financa bazo, jam de certa tempo, suferas skuojn. Se la pandemio nature damaĝas la tutmondan ekonomion, tiam, evidente, ĝi atingos ankaŭ nian movadon. Tamen, ni ne rajtas pensi nur ekonomie, kiam temas pri la socia malsan-minaco. Ni do klopu listigi negativajn kaj (se ili ekzistas) pozitivajn rezultojn de la pandemio, je nia movado.

Negativaj faktoroj:

Niaj ĉeestaj eventoj (internaciaj, regionaj kaj landaj kongresoj, kursoj, renkontiĝoj kaj simplaj klubaj kunsidoj) estas rompitaj. Niaj asocioj povas perdi anojn kaj sian rolon kiel alproksimigantoj de membroj. Faritaj aliĝoj perdiĝos aŭ prokrastiĝos. Multaj fervoraj samideanoj malĝojos pro tio.

Sekve de tia manko de personaj kontaktoj, multaj asocioj ne plu aliĝos al siaj asocioj, en loka, landa kaj internacia niveloj.

Prelegoj pri Esperanto en lernejoj kaj kultur-asocioj ĉesos okazi dum certa tempo. Sekve, malpliĝos varbado de eblaj personoj, interesitaj pri nia lingvo.

Turismo, ligita kun Esperanto (ekskursoj, kongresaj karavanoj), malgrandiĝos.

Pozitivaj faktoroj:

- Pro bezono de la socia izoliĝo, interretaj personaj kontaktoj pliintensiĝas, skribe kaj parole. Precipe la junulara movado (BEJO kaj TEJO, ekzemple) lanĉas spontanajn babiladojn, por praktikado de la lingvo kaj amika interapogo.

- En grupaj diskutlistoj en interreto la partoprenoj estas jam nun pli intensaj kaj pli fervoraj. Svarmas belaj filmetoj kaj podkasto, kiuj vigligas la homojn.

- Multaj homoj interesiĝas pri la reta lernado de nia lingvo. Ĉi tiu tempo povas esti favora, por intensa varbado de novaj kursanoj. *Duolingo* estas ekzemplo. En Brazilo, la konata gvidanto de diskutlisto kaj retejo por apogi la lernadon, s-ro Adonis Saliba, rapide varbis dekojn da interesitoj por sia reta kurso. Izolitaj personoj havas pli da tempo por studado.

- La konata retejo *edukado.net* intensigis sian agadon, kaj jam proponas plurajn intervjuojn kun eminentaj fakuloj pri la nuntempa krizo, krom aliaj edukaj iniciatoj.

- Diversaj revuoj disponigas abundan kaj riĉan senpagan materialon: ekzemple: “Monato”, “Juna Amiko”, reta revuo “Esperanto” de UEA, “La Turka Stelo”.

- Relative facile estas organizi prelegojn por klubanoj kaj asocioj per skajpo. Kultura Kooperativo de Esperantistoj en Rio-de-Ĵanejro, jam tion faras de kelka tempo. Surbaze de la disponebla teknologio, eĉ surgatojn de kongresoj, kiujn oni devas prokrasti, eblas pretigi per interretaj eventoj.

- Espereble pli da esperantistoj legos librojn dum sia izola tempo. Tio certe plialtigos la nivelon de la lingvokono kaj kleriĝo inter ni. Multaj libroj en nia lingvo estas disponeblaj en interreto.

Nu, ĉi tiu skizo tute ne pretendas elĉerpi la temon. Rimarku: pro optimismo, mi listigis kvar negativajn kaj sep pozitivajn rezultojn de la pandemio. Fakte, tio estas nur provoko. La Esperanta RetRadio klopodas teni alte la animon de esperantistoj. Ni ĉiuj povas krei eblecojn por transformi la nunan krizon en favoran cirkonstancon por nia Esperantomovado. Ni ne forgesu, ke en la tempo de la tutmonda sufero, ankaŭ tutmonda solidareco povas burĝoni. Kaj en la etoso de solidareco, certe Esperanto povas kreski.

Robert Kamiński

Viruso Covid-19 en nia lando

Pasas la sekva monato de la batalo kontraŭ la kronviruso. Limigoj ŝanĝiĝas, estas enkondukataj novaj. Ilia logiko levas dubon pri la racio de niaj ŝtataj estroj. De multaj flankoj ni aŭdas nekontroleblajn informojn. Registaro fanfaronas, ke ĉio iras glate kaj laŭ plano. Interreto estas plena de strangaj kaj panikaj informoj, novaĵoj. Al kiu ni devas kredi? Laŭ logiko, ni devus kredi al la registaro, sed... Sube mi iom sarkasme prezentos kelkajn absurdojn en Pollando, ligitajn kun la nuntempa agado kontraŭ pandemio. Lastatempe en pola interreto ekaperis tiaj rimarkoj.

Kio estas konata rilate al la nuna pandemio:

1. Vi ne rajtas forlasi la domon, sed vi povas foriri, se necese.
2. Maskoj ne helpas, sed ĝuste ekde la 16-a de aprilo vi devas porti maskojn, ĉar tiam ili komencos helpi.
3. Ĉi tiu viruso estas mortiga, sed ĝi estas esence nenio terura.
4. Gantoj ne helpas, sed necesas ilin porti por eniri vendejojn.
5. La plej grava afero estas sekureco de polaj virinoj kaj poloj, sed pli gravas okazigi balotojn.
6. La viruso ne atakas infanojn, sed infanoj estas en danĝero.
7. Multloke mankas taŭga ekipaĵo por batali kontraŭ viruso, sed se estos necese, ĝi ekaperos.
8. Estas multaj simptomoj de la virusa malsano, sed pli ol 80% de malsanuloj ne havas videblajn simptomojn.
9. Vi eble ne scias, ke vi infektiĝas kaj infektas aliajn, sed vi ne rajtas fari la teston ĝis vi komencos havi tipajn simptomojn.

10. Vi mem ne povas viziti maljunajn parencojn, sed kuriero, kiun vi dungas por helpi ilin, ĉiutage kontaktiĝas kun centoj da homoj.

11. Dum la pandemio monpunoj ne estas laŭleĝe anoncigitaj, sed polico povas puni vin per monpuno ĝis 30.000 zl.

12. Krizostato ne estas deklarita, sed la aŭtoritatoj kondukas kvazaŭ estus.

13. Post reveno el eksterlando, ĉiuj estas devigataj (submeti sin al la 14-taga kvaranteno), sed ne ŝoforoj de kamionoj.

14. Personaj datumoj estas leĝe protektataj, sed vi devas malkaŝi ilin dum kvaranteno.

15. La balotoj estas sekretaj, sed se vi plenigas la voĉdonkarton por korespondaj balotoj, vi devas meti PESEL-numeron.

16. Necesas havi purajn fenestrojn kaj licencplatojn, sed ne lavu aŭtojn.

17. Zorgu pri sekureco, sed vi ne rajtas ŝanĝi vintrajn aŭtopneŭmojn al someraj.

18. Oni malfermis tombejojn, ĉar la viruso minacas, sed ne al la prezidanto Jarosław Kaczyński, kiu kun akompanaro vizitis la tombon de sia patrino.

19. Arbaroj kaj naciaj parkoj estas fermitaj, sed se vi volas aerumi, vi povas promeni nur sur la urbaj stratoj.

20. En vendejo de la reto "Biedronka" povas esti samtempe 15 homoj + la skipo, sed en preĝejo, kun la simila areo, 5 homoj kaj pastro.

21. La registaro estas preparita por ĉiu eventualaĵo, sed se la ĝusta leĝo ne estas preparita, oni faros ĝin nokte, aŭ dum 15 minutoj.

Ĉio estas tiel klara. Ĉu vi komprenas? Bonvenon al Pollando!




www.pej.pl



Pro la epidemia situacio en Pollando, PEJ-semajnfino en Triurbo, planata por la 27 – 29 de marto 2020, estas nuligita! Ni pardonpetas! Post la trankviliĝo de la situacio, ni anoncos la sekvan eblon por E-renkontiĝi.

Se vi preterlasis la elsendon en la retejo “Na Synapsach” dum la lasta aprila semajno, en kiu nia sekretario Tobiasz rakontis (pri la historio, kulturo kaj estonto de Esperanto, ne maltrankviliĝu - la elsendo jam haveblas kiel podkasto!



https://www.mixcloud.com/na-synapsach/a-mo%C5%BCe-esperanto-proponuje-tobiasz-kubisiowski-pola-esperanto-junularo/?fbclid=IwAR0IC_Z_0YUun0c7tAPoL_CUy7ePfj7TsL5w_002NOD-zUL3ODB7iTvGku0

Raportoj, rakontoj

Robert Kamiński

Forgesita fluganta Ludoviko Zamenhof

Kia stranga titolo? Pri kio temas? Ĉu Zamenhof flugis? Verdire, temas pri la aviadilo, kiu portis la nomon „Ludwik Zamenhof”. Ĝi ne estis iu malgranda, privata aviadilo, sed la granda, pasaĝera flugmaŝino Tu-134, regule fluganta en la pola flugkompanio LOT.

Mi priskribos ĉion, de komenco, kaj mi prezentos efikojn de mia detektiva laboro. Informon pri la aviadilo mi trovis hazarde en interreto. En la Nacia Cifereca Fotoarkivo mi trovis nigran-blankan foton de la fama pola fotisto kun la priskribo: ”Tupolev Tu-134, la aviadilo ”Ludwik Zamenhof” (SP-LGA) dum la flughavena priservado. En la fono la teraso por vizitantoj de la Internacia Flughaveno en Varsovio”. Unue mi ne kredis, ke tio estas vero. Mi traktis la informon kiel tipan eraran priskribon, precipe, ke la surskribo, videbla sur la dekstra flanko de la flugmaŝino, ne estas tre bone

legebla. Unue mi serĉis informon pri la aŭtoro de la foto. Parzniewski Maciej estis konata fotisto, kiu eldonis kelkajn fotoalbumojn pri aviado. Poste mi sendis kelkajn demandleterojn al diversaj personoj kaj firmaoj. Rapide mi ricevis respondon de Civila Aviada Oficejo, en kiu mi trovis konfirmon pri ekzisto de la aviadilo kaj korekton de surskribo de la foto (ĝusta registra numero de la aviadilo estas SP-LGD). Jen la respondo: „Tu-134 seria numero 0805, jaro de konstruado konstruo 1969, identiga marko SP-LGD estis enskribita en la registron, la 26-an de majo 1969 sub la registra numero 1460. Eksigo el la registro estis, laŭ la peto de LOT Polish Airlines, 29.07.1982. LOT Pola Flugkompanio estis la posedanto dum la tuta registra periodo. La posta sorto de la aviadilo estas al ni nekonata.”



Poste mi trovis similan konfirmon pri la flugmaŝino en aliaj interretaj registroj. Kio okazis poste? Pro nesufiĉa nombro de pasaĝeraj aviadiloj, aĉetis ĝin la flugkompanio “Aeroflot” el Sovietunio. La nova posedanto farbis aviadilon per propraj koloroj kaj registris ĝin sub la numero CCCP-65922. La aviadilo estis uzata ĝis 1994. Sume ĝi flugis 24 jarojn kaj 7 monatojn. En la sovetunia periodo, pro la aĝo, Tu-134 CCCP-65922 ne flugis regule en la flugkompanio, sed estis uzata en armeo. Ĝi finis sian flugadon en la flughaveno de Omsk, en la okcidenta Siberio. kaj tie ĝi restis konservita kiel historia eksponaĵo. Kelkaj Tu-134, kiuj portis gravajn

personojn, restis en aviadilaj muzeoj en kelkaj lokoj en Rusio, Ukrainio kaj en Pollando (Krakova Aviada Muzeo).

Bedaŭrine, nun demanditaj diversaj, eĉ eminentaj, polaj esperantistoj nenion scias pri la aviadilo “Ludwik Zamenhof”. Mi komprenas, ke aviadilaj flugoj tiutempe (en sepdekaj jaroj) en Pollando estis multekostaj kaj malmultaj homoj povis vojaĝi tiamaniere. Pri la ŝipo “Zamenhof” aŭdis preskaŭ ĉiuj esperantistoj, sed pri la samnoma aviadilo - neniu. Eble mi eraras. Mi petas esperantistojn, skribu al mi, ĉu vi iam aŭdis pri 13 jaroj de la fluganta aviadilo “Ludwik Zamenhof”.



Ĉu la aviadilo plu ekzistas? La lasta interreta enskribo pri ĝi devenas de 2012. Mi komencis korespondi kun rusaj esperantistoj kaj eble ili povas helpi al mi. Sur la aktuala satelita foto de la flughaveno en Tomsk (el Googlemap) estas videbla staranta flanke de manovraj vojoj aviadilo, simila al Tu-134. Sed ĉu ĝi estas “nia” fluganta iama ZEO? Eble ni ekscios en futuro.

Jen kelkaj teknikaj informoj pri tiaspeca flugmaŝino.

Tu-134 – pasaĝera sovetia aviadilo, por mallongaj kaj mezlongaj flugoj. Projektita en sep versioj en la oficejo de Tupolev. Amasproduktita en 1966-1984, fare de la Aviada Fabriko en Ĥarkovo.

La unua komerca flugo, en la koloroj de Aeroflot, okazis en septembro 1967. La unua versio Tu-134 povis enlokigi maksimume 72 pasaĝerojn. La aviadilo estis sukceso kaj estis eksportata al multaj socialismaj landoj. La plej granda sukceso por la projektistoj kaj por la tuta sovetia aviada industrio estis akiro, en novembro 1968, de la internacia ICAO-atestilo, konforma al la britaj BCAR-normoj. Interese estas ke la atestilon aljuĝis Pola Inspektado por Kontrolo de Civilaj Aviadiloj. Ĉi tiu atestilo faciligis uzon de internaciaj aerspacoj kaj vendoj ekster la landoj de la socialisma

bloko. La aviadilo estis pozitive akceptita de pilotoj kaj surteraj servistoj. La aviadilo estis sukcesa, sed la sukceso de la aviadilo okazis pro tio, ĉar ne estis alia konkura projekto en la orienta ŝtatbloko. La lasta uzanto de la pasaĝera versio de la aviadilo jam en Rusujo estis la flukompanio *Alrosa*, kiu retiris la aviadilon el la uzo en 2019.

Tie vi povas trovi foton de la aviadilo:

https://www.szukajwarchiwach.gov.pl/de/jednostka/-jednostka/10413477/obiekty/594705?fbclid=IwAR02Ld-kpzAl_j5SAktOAGE1Sg9H2yJD2f3MX1lnMh1tDYyzw1oO715Y8c#opis_obiektu

Aleksander Zdechlik

Ne ekzistas malbono, kiu ne kaŭzus bonon

Komence de marto 2020, en Pollando eksplodis epidemio de la malsano Covid-19, kaŭzita de kronviruso. Ni antaŭe observis batalon kontraŭ la malsano en Ĉinio, sed ĝi tiam okazis malproksime, do ni supozis, ke ĝi ne okazos en Eŭropo kaj en Pollando.

Post 3 monatoj, la malsano venis al nia kontinento kaj ĝi ŝanĝis ĉion en nia vivo.

Multege da homoj mortis kaj mortas. Ĉiutage en Eŭropo malaperas pli ol mil homojn. Pri kvanto de viktimoj en la mondo, mi ne skribos.

Por defendi sian loĝantaron, ŝtatoj fermis limojn kaj decidis nuligi por homoj ĉiujn pasaĝerajn kunligojn kun aliaj landoj. Nur malmultaj homoj havas rajton transpaŝi ŝtatlimojn kaj kiam ili tion sukcesas, ili tuj devas kvaranteni. Fermitaj estas multaj institucioj, kiel vendejoj, lernejoj, restoracioj, ne funkcias teatroj kaj entreprenoj. Agas nur tiuj institucioj, kiuj devas agi.

Kompreneble, la epidemia stato kaŭzis multajn sociajn ŝanĝojn. Homoj estas devigataj, laŭ la ordonoj de registaroj, ŝanĝi siajn kutimojn. Tio signifas, ke ili devas ĉefe resti hejme kaj vivi iom izolite. Iuj homoj akceptas tion kaj aliaj ne, sed saĝaj homoj scias, ke tiel oni devas konduki. Grandaj ŝanĝoj sekvis en multaj branĉoj. Homoj, kiuj en sia laboro uzis komputilon, nun laboras hejme, uzante propran komputilon.



Ŝanĝiĝis la eduka sistemo. Nun instruistoj devas rapide lerni, kiel instrui per tiaj modernaj iloj kiel ekz. interreto. Tio, kio iam estis neimagebla en niaj landoj, nun okazas kiel ĉiutaga neceso. Kaŭze de la epidemio komenciĝas ekonomia krizo. Homoj devos vivi iom malpli riĉe kaj estiĝos senlaboruloj.

Kompreneble, la epidemio kaj la krizo kaŭzos diversajn aliajn problemojn, sed iom post iom la problemoj estos solvataj. Epidemio iam malaperos. Homoj revenos al siaj laboroj, sed ĉu ĉio estos simila? Estos branĉoj, kiuj preskaŭ estos ne ŝanĝitaj kaj estos branĉoj, kiuj estos tute aliaj. Ni povas nur imagi tion.

Kaj nun mi starigos demandojn. Ĉu post la epidemio ne venos iam tempo por homoj inteligentaj, kiuj tuj adaptiĝos al novaj kondiĉoj? Ĉu esperantistoj trovos sian lokon kaj ŝancon en tiu nova mondo? Jes, tio eblas. Jen la ekzemplo. Ni, esperantistoj, bezonas gejunulojn kaj gejunuloj bezonas esti bone edukitaj. Do, se esperantistoj eniros energie en la branĉon bone konatan kiel eduka sistemo, tiam sukceso estos videbla sur horizonto. Oni povas imagi, ke post la tragedio, multaj instruistoj komprenos sistemon de la malproksima (virtuala) edukado. Ili rimarkos, ke la sistemo estos ŝanco por malaltigi kostojn de edukado. Por tiu sistemo ne estos necesaj konstruaĵoj, oni ne devos dungi purigistinojn kaj aliajn laboristojn, kiuj kutime zorgas pri uzebleco de ĉiuj ĉambroj en lernejoj. Malaperos kostoj de energio kaj aliaj. Instruistoj rimarkos ankaŭ, ke la sistemo estas tre utila por instrui, precipe talentajn lernantojn. Sed, kie mi vidas esperantistojn en la sistemo? Kie estos loko por ili? Esperantistoj jam instruas per tia sistemo, sed ili instruas preskaŭ ĉiam Esperanton. Do, sufiĉaj spertoj ekzistas, sed instruado devos esti iom pli vasta. Necese estos bone instrui homojn, precipe gejunulojn, je la meza kaj alta niveloj. Meritas rimarki, ke simila sistemo de edukado jam estis elprovita en la mondo, sed ĝis nun nur malmultaj ineresiĝis pri tio. Mi menciu, ke la eduksistemo en Aŭstralio jam tion praktikas. Pro longaj distancoj inter homoj, aŭstralianoj jam efike praktikas instruadon per radiotelefonoj. Mi certas, ke ili nun uzas ankaŭ pli modernajn ilojn, ekz. interreton. Bone estus transdoni spertojn de aŭstralianoj al niaj fakuloj. Por la transdono de la spertoj oni povas uzi Esperanton. Poste, la fina tasko estus fondi lernejojn, kiuj funkcios laŭ la sistemo de la enreta edukado. Mi revas pri iu lernejo, kie laborlingvo estos Esperanto kaj fakuloj de la tuta mondo estos esperantistoj-instruistoj.

Ĉe la fino mi volas citi la polan diron: „ne ekzistas malbono, kiu ne kaŭzus bonon”.

Do, ni memoru, ke nia tasko estas travivi la malfacilan tempon.



Bjalistoka Esperanto-Societo

Literatura Konkurso 2020
„Pandemio – neĉiutaga ĉiutageco”

Podlaĥia Libraro Łukasz Górnicki en Bjalistoko kaj Bjalistoka Esperanto-Societo anoncas la 10-an literaturan konkurson „Esperanto ligas homojn” por rakonto sub la titolo „**Pandemio – neĉiutaga ĉiutageco**”.

Konkursa regularo trovebla ĉe:
<https://espero.bialystok.pl/eo/literatura-konkurso-2020/>

Gazetaraj Komunikoj de UEA, N-ro 864

Virtualaj eventoj anstataŭ la Malferma Tago kaj la UK en 2020

Kiel respondo al la koronavirusa krizo, la Esperanto-komunumo, kiel la cetera mondo, ekorganizas virtualajn eventojn anstataŭ la nuligitaj aŭ prokrastitaj ĉeestajn konferencojn. Grandan parton pri tio eblas koni per EventaServo.org, senpaga servo de UEA kaj TEJO.

La 52-a Malferma Tago, planita por la 25-a de aprilo, okazos virtuale. La programo estos baldaŭ anoncita per aparta komunikado kaj ĝisdatigita ĉe eventaservo.org/e/mt52.

Jam antaŭ duonmonato UEA informis pri la plano okazigi virtualan eventon anstataŭ la prokrastita UK (GK861, GK862). Por tiu Virtuala Kongreso (VK) la Estraro faras kelkajn rekomendojn:

1. Subtene al tiu virtuala evento, la aliĝintoj al 105-a UK en Montrealo



povas donaci sian kotizon per mesaĝo al la Kongresa Fako de UEA, skribante al: kongresoj@co.uea.org, sub la temo “Kongresa kotizo 2020”.

2. Por kovri la antaŭvidatan financon malgajnon pro la prokrastita UK, oni ankaŭ povos subteni UEA per simbola aliĝo al la VK (detaloj pri tio estos baldaŭ anoncitaj). Tio aldone helpos nin konkretigi la aferon ekzemple per pli bonaj teknologiaj rimedoj.

3. La VK estas planata por okazi dum la komenco de aŭgusto kaj provos reprodukti la esencajn elementojn de la UK, tamen en la nova virtuala formato, kaj samtempe enkonduki novajn ideojn.

4. Ĉirkaŭ la VK okazos ankaŭ pli longa festivaleca okazaĵo dum julio-aŭgusto 2020.

5. La lastan semajnon de julio okazos la 53-a Virtuala Konferenco de ILEI. Ĉiuj estas kuraĝigitaj sekvi la informojn de ILEI vizitante: www.ilei.info.

6. La 25-an de aprilo aperos informoj de TEJO pri la IJK. Ĉiuj estas ankaŭ kuraĝigitaj sekvi la informojn de TEJO.

7. La aliĝo al la VK estos senpaga (tial des pli gravas donacsubteno de esperantistoj). La VK kaj la festivalo ĉirkaŭ ĝi estos oportune reklamitaj en la komunikkanaloj de UEA kaj sociaj retejoj, kiel informa agado pri Esperanto al la mondo.

UEA gratulas la sukcesan okazigon de la unuaj virtualaj landaj kunvenoj: la korean: esperanto.or.kr kaj la iranano: espero.ir/eo/kongresa-programo, kiujn salutis la prezidanto de UEA kaj virtuale partoprenis kvar estraranoj. Fine, UEA invitas esperantistojn aliĝi al la virtuala Poliglota Kunveno, kiu okazos 29-31 de majo, kaj estas sponsorita de nia Asocio: polyglotgathering.com/2020.



Historio de rubaĵoj – la dua parto

Rubaĵoj en Pollando

Kaj kia estis la situacio en Pollando? Ni rigardu Varsovion. Tie, en 1540, oni fondis sanitaran policon, kiu kontrolis la sanitaran ordon kaj prizorgis la staton de higieno en la urbo. Oni malpermesis ĵeti malpurigaĵojn sur stratojn, sed tio ne helpis. En 1641, loĝantoj estis devigitaj teni stratojn puraj antaŭ siaj posedaĵoj kaj forĵetaĵojn kaj sterkon forporti al malpuraĵejo (interese, ĉi tiuj ordonoj ne koncernis magnatojn!). En 1695 la urbo aĉetis ĉevalojn kaj ĉarojn por forigi restaĵojn. En 1722 estis malpermesite porti malpuraĵojn al la monto *Gnojna (Sterka)*, sed la malpermeso ne estis respektita kaj ĝis la jaro 1844 tie ekzistis amasigejo. En la dua duono de la 18-a jarcento, dank'al la granda marŝalo de la Krono Franciszek Bieliński, iom pliboniĝis purecstato en la ĉefurbo. Estis kreita firmao por forigado de malpuraĵoj (30 homoj). Malgraŭ tio, plej multaj el la restaĵoj ankoraŭ trafis al stratoj, al Vistulo aŭ al la lkontraŭleĝaj elŝutejoj. Ne estis pli bone dum la dispartigoj de Pollando. Tamen, oni faris provojn batali kontraŭ malpuraĵoj. En 1912, la urba purigad-kompanio havis preskaŭ 250 homojn kaj 134 ĉevalojn. Oni konstruis bruligejon de malpuraĵoj (ĝi funkciis ĝis 1944). En 1927 fondiĝis la Purigadentreveno, kiu en 1929 dungis 2 000 laborantojn, havis 64 aŭtojn kaj 160 ĉevalojn.

La malpuraĵproblemo daŭre ekzistas ekde la komenco de la homa civilizo. Hodiaŭ oni devas fari ĉion, por ke malpuraĵoj ne superŝutu kaj regu nian vivon.

Ni sukcesos, se ĉiu el ni prizorgos sian propran ĉirkaŭaĵon.



Robert Kamiński

Salmineja kastelo en Wieliczka

Al la Listo de Mondaj Heredaĵoj de Unesko estas enskribataj eksterordinaraj aŭ unikaj kulturaj kaj naturaj objektoj. La enskribo al la listo estas samsignifa kun speciala protekto de la enskribaĵoj. Ĝis nun la listo jam inkluzivas pli ol mil objektoj, deklaritaj de ŝtatoj el ĉiuj kontinentoj. 16 el ili situas en Pollando. Ni ekkonu ilin ĉiujn!

En la Pola Esperantisto ni jam skribis pri *Popola Halo* en Wrocław, la *Preĝejo de Paco* en Jawor kaj pri la salminejo en Wieliczka. Wieliczka-minejo estis enskribita al la listo en 1978. En 2013, ĉi tiu enskribo estis pligrandigita kaj oni aldonis al ĝi *Zamek Żupny - Salmineja Kastelo*. (Żupa - laŭ la malnova pola lingvo - salminejo) Multaj turistoj, vizitantaj la historian minejon de salo, ne scias pri la Kastelo, kiu estas grava parto de la minejo. La kastelo situas en la centro de Wieliczka, inter la ŝakto Regis kaj la ŝakto Daniłowicz.



Historio

La historio de la Salmineja Kastelo en Wieliczka datiĝas de la fino de la 13-a jarcento. La komplekso estis establita kiel la sidejo de unu el la plej grandaj entreprenoj en Eŭropo - Krakova Salfabriko - al kiu apartenis minejoj en Wieliczka kaj Bochnia. La kastelo estis la centro de la ĉiutaga vivo de la minejaj dungitoj. El la kastela turo ili estis vokataj por labori kaj la laboriloj kaj sebo, necesa por lumigi la minejajn koridorojn, estis disdonataj el la kastelaj magazenoj. Tie ankaŭ, en t.n. salmineja kuirejo, kiu estis la unua en Pollando amasmanĝiga entrepreno, la ministoj ricevadis, krom siajn salajrojn kaj manĝaĵojn. Krome, en la kastelaj ejoj troviĝis juĝejo, malliberejo kaj kapelo, ankaŭ loĝejoj de la plej gravaj minejaj oficistoj. Dum la aŭstria tempo, la Kastelo komencis servi al turistoj. Tie estis vendataj enirbiletoj por viziti salminejon.

La kastela komplekso konsistas el kelkaj konstruaĵoj el diversaj jaroj. Oni diras pri la meza, norda kaj suda konstruaĵoj, la mezepoka turo, kiu iam estis fragmento de la defendfortikaĵo de Wieliczka, kaj ankaŭ pri la restaĵoj de la menciita kuirejo kaj unu ŝakto de la 13-a jarcento. Hodiaŭ, la Kastelo kiel sidejo de la Wieliczka Salmineja Muzeo, estas loko de permanentaj kaj portempaj ekspozicioj, sciencaj esploroj kaj organiza laboro.

Ĝuste tie oni prezentas al vizitantoj, unu el la plej valoraj en la mondo, kolekton da saluoj – originalaj objektoj, devenantaj de la tuta mondo. En la kastela arkivejo troviĝas nepritaksebla libro-kolekto, mineja arkivo kaj kolekto de pli ol 3.000 kartografiaj objektoj. Grave estas, ke la menciita dokumentaro grandaparte estis kreita ĝuste en la Salmineja Kastelo, kiel frukto de kelkjarcenta administrado de la Krakovaj Salminejoj.



Bronza modelo de la Kastelo



Korto inter meza kaj norda Kastelo

Meza Kastelo

La plej malnova objekto de la kastela komplekso estas t.n. "Domo meze de la minejo", nomata ankaŭ "Meza Kastelo". Tie troviĝis la ĉefsidejo de la administranto de la krakova salentreveno. Kiel la unua, estis konstruita la orienta parto de la konstruaĵo – libere staranta, rektangula konstruaĵo el sabloŝtono. La situo de ĉi tiu unua parto de la Kastelo havis strategian signifon – dank' al ĝia situo en la malseka tereno, proksime al la malgranda rivero Srawa, neebus fari subfosaĵojn kaze de sieĝo. En la 14-a jarcento, oni vastigis la konstruaĵon de la okcidenta flanko per la teretaĝa parto kun nekutima riĉeco de volboj. Apud la defenda murego ekestis helpkonstruaĵoj. Laŭ la arkeologiaj eltrovaĵoj, ni scias, ke tiutempe en la Kastelo restadis malgranda soldata gardistaro, kies tasko estis protekti la loĝantaron kaj salmagazenojn. Gravaj ŝanĝoj okazis dum la regado de la reĝo Kazimiro la Granda - tiam la Kastelo eniris la fortikaĵon de Wieliczka, kaj samtempe ĝi akiris eĉ pli reprezentan karakteron. La plej bona ekzemplo de tio estis la rekonstruo de la municipa salono, konata hodiaŭ kiel Gotika Halo - la ĉambro en la teretaĝo, kun la rara ripa volbo, apogita sur unu kolono, ege malofta en sekulara konstruado. La sekvaj jarcentoj alportis plian rekonstruadon kaj plivastigon de tiu parto de la Kastelo.

Unu el la plej gravaj ŝanĝoj, jam en la spirito de la renesanco, okazis en la 16-a jarcento. La okcidenta parto de la Kastelo estis levita ĝis la nivelo de la dua etaĝo kaj oni konstruis novajn plafonojn, ornamitaj per kasedoj kaj traboj, kaj atikon, kronanta murojn.

Norda Kastelo

La konstruado de la Norda Kastelo, komenciĝis en la unua duono de la 14-a jarcento kaj finiĝis en la sekva jarcento. Sur la teretaĝo estis servoĉambroj, kaj sur la unua etaĝo - la kapelo al St. Stanislao kaj loĝĉambroj por altrangaj oficialuloj. En la kelo, estis mallibereja ĉambro, nomata "Groch" (Pizo). La konstruaĵo konservis sian karakteron ĝis hodiaŭ, sed rezulte de la historiaj ŝanĝoj, ĝi perdis sian iaman riĉan ornamadon, meblojn kaj plankojn. La renovigo de la Norda Kastelo finiĝis en 1992 kaj de tiam ĝi servas al Krakova Salmineja Muzeo Wieliczka. Rimarkinda detalo estas la blazono la familio Boner (estraranoj de la minejo dum la unua duono de la 16-a jarcento), kiu videblas sur la norda muro.



Foto B. Cichoń

Suda Konstruaĵo

La Suda Kastelo estas la plej nova el la objektoj de la komplekso. Ĝia teretaĝo estis konstruita jam en la 19-a jarcento, en 1834-1836, sur la loko de pli fruaj, lignaj mastrumkonstruaĵoj. La unua etaĝo de la objekto estis aldonita en 1905. Tie troviĝis i.a. kancelarioj, loĝejoj por gardistoj kaj magazeno por fajrobrigadaj ekipaĵoj. Dum la jaroj 1945–1992 la konstruaĵo funkciis kiel infanĝardeno. Hodiaŭ la Suda Kastelo gastigas muzeajn studiojn, muzeajn gastĉambrojn kaj restoracion.

Homoj

Roman Dobrzyński

Erika

Erika Rauschert, la 21-jara membrino de Germana Esperanto-Junularo, venis al Varsovio la 15-an de aprilo 1965, laŭ la invito de Pola Esperanto-Junularo. Neniam pli frue tiuspeca vizito okazis. Ja ne ekzistis rilatoj inter Federacia Germanio kaj Pola Popola Respubliko. Dividis ilin la fera kurteno. Ĉi-foje traboris ĝin Esperanto. Erika lernis la lingvon internacian tuj post sia abiturientiĝo. Esperanto, surprize, montriĝis ŝia fenestro al la mondo. Ŝi partoprenis en Esperantaj aranĝoj, konatiĝis kun samaĝuloj kaj ligis korespondajn kontaktojn, interalie kun orienteŭropanoj. Unu el ili estis mi. Mia korespondantino multe demandis min pri Pollando, pri ĝia kulturo kaj historio, ankaŭ pri la milita tempo.

Erika pasigis du semajnojn en Varsovio, inter multaj junaj esperantistoj. Ravis ŝin la leviĝo de Varsovio el ruinoj. En la ĵus rekonstruita Granda Teatro ŝi ĝuis la premieran prezenton de la opero „Straszny Dwór” de S. Moniuszko. Ŝi plurfoje estis intervjuata, precipe por la Esperantaj disaŭdigoj de Pola Radio. Plej multe da ĝojo ŝi ĉerpis el la koraj kontaktoj kun homoj, kiujn ŝi la unuan fojon vidis. Tiutempe la plimulto da poloj memoris la germanan okupacion, sed neniu malamike aludis ŝian germanecon. Ŝi admiris la tradician festadon de la Pasko. La Grandan Dimanĉon, frumatene mi kondukis ŝin al la preĝejo, en kies koruso mi kantis. Post la rezurekta meso, ŝi estis scivoleme ĉirkaŭita de ĉiuj ĥoranoj. La orgenisto alparolis ŝin germane. Ŝi miris kaj demandis, kie li lernis la germanan lingvon. Li respondis: Mi pasigis kvin jarojn en Auschwitz. Erika stuporiĝis. Tiam la muzikisto ĉirkaŭprenis ŝin kaj kisis.



Oktobre 1965, mi veturis per la pola skotero „Osa” al la okcidenta Germanio, laŭ la invito de Germana Esperanto-Junularo, por prelegi pri Pollando en esperantistaj kluboj. La rondvojaĝo komenciĝis en Munkeno kaj finiĝis en Hamburgo. Tie gastigis min Erika Rauschert. En la jaro 1966 ni trifoje renkontiĝis en la orienta Berlino. Mi povis tien veturi danke al invitiloj de la komplezema esperantisto Hieronimus Stroinski. Erika rajtis transpaŝi la internan limon ĉe la stacio Friedrichstrasse, pagante 5 okcidentgermanajn markojn. Tio estis nur unutagaj, kelkhoraj renkontiĝoj, sed sufiĉis, ke niakaze Esperanto transformiĝu en edzperanto. Mi, kiel ĵurnalisto, kies laborilo estis la pola lingvo, ne intencis translokiĝi al Germanio, sed Erika, surprize, volentis loĝi en Pollando. Ŝia preteco, vivi en la malriĉa lando kaj grandparte detruita urbo, embarasigis kaj kortuŝis min.

La deklaro de Erika, edziniĝi al polo kaj translokiĝi al lia lando, konsternis ŝiajn gepatrojn. Okazis familia konsilio, kiu unuvoĉe malaprobis tiun ĉi decidon, sed Erika uzis, kiel argumenton, sian rajton de la plenkreska homo. La avo Rauschert, Nestoro de la klano, aparte persvadis la nepinon, ke ŝi misagas. Tiam ŝi demandis, kial li edziĝis, kaj aŭdis: Ĉar mi enamiĝis. Mi ankaŭ – diris Erika. La finon de la jaro 1966 mi pasigis en la hejmo de la gepatroj de Erika, kiel ŝia formala fianĉo. Ni festis la Kristnaskon en la familia etoso, kaj veturis saluti la novan jaron 1967 al Munstero, partoprenante en la tradicia Esperanta Silvestro - la aranĝo de

Germana Esperanto-Junularo. La 4-an de januaro Erika kaj mi geedziĝis en la urba oficejo, en Hamburgo. La geedziĝan ĵuron mi diris en Esperanto kaj Liselotte Meyer, la amikino de Erika, tradukis ĝin en la germanan. Mia edzino estiĝis tiumomente Erika Dobrzyński, ĉar la germana lingvo ne femaligas la nomon de edzo.

Sinjorino Dobrzyński venis kun la rajto konstante loĝi en Pollando, la 28-an de junio 1967, post la duonjara proceduro. Mi jam havis novan loĝejon, sed ankoraŭ dividis ĝin kun la frato Marian kaj gepatroj. En nia familio estis kvar fratoj kaj unusola fratino. Ŝi mortis unujara, pro la manko de kuraciloj dum la milito, kiam germanoj okupaciis Pollandon. Maria naskiĝis, same kiel Erika, en la jaro 1943. Nenio mirinda, ke mia patrino ekamis sian novan bofilinon per la tuta koro, kvazaŭ rezurektintan filinon. Erika estis en la sesa monato de gravedeco. Oktobre ŝi naskis la filon Feliks kaj decembre okazis nia religia geedziĝo laŭ la katolika rito. Celebris ĝin, en la varsovia katedralo, la episkopo Zbigniew Kraszewski. Lia Ekscelenco uzis alterne la polan kaj germanan lingvojn. La ceremonio havis fakte ekumenan karakteron, ĉar Erika estis protestantino. La geedziĝfestoj okazis en la malnovurba gotika restoracio „Krokodyl”, kiun admiris la gepatroj de Erika. Ili tiam trovis Pollandon ne nur kiel malriĉa kaj komunista lando.

En 1969 Erika naskis la filinon Ewa, ni ekloĝis solaj, en la propra loĝejo, kaj tiel formiĝis nia propra rondo familia, internacia, en kiu estis parolataj tri lingvoj. Feliks kaj Ewa parolis denaske la germanan kun sia patrino, ĉar ŝi ne konis la polan, mi instruis ilin pole kaj nia komuna lingvo estis Esperanto, kiun bone kaptis la gefiloj. Kiam ili iris al antaŭlernejo, Erika havis pli da tempo por ekzerci la polan lingvon. Krome, ŝi kunlaboris kun la Esperanta redakcio de Pola Radio. Ekinteresiĝis pri ŝi la najbara, germanlingva redakcio kaj dungis ŝin kiel sian konstantan parolistinon. Tiel komenciĝis tute nova kaj fascina periodo en la vivo de mia edzino. Ŝi rapide ekregis la teknikon de la radia profesio kaj fariĝis elstara redaktorino de Pola Radio. Ŝi okupiĝis pri la pola kulturo, dumlabore profundigis sian scion pri ĝi, kaj farante intervjuojn konatiĝis kun multaj korifeoj de la polaj diverspecaj artoj. Tiu ĉi laboro donis al ŝi plezuron, sed ankaŭ la senton de la alta socia avanco. Mi, kiel ĵurnalisto de Pola Televido, multe vojaĝis kaj mi ofte kunprenis mian edzinon. Ni vizitis kune multajn landojn, kio estis bonŝanca kombino de la profesia laboro kaj la proprasperta konatiĝo kun la mondo.

Komence de la 90-aj jaroj, Erika akute malsaniĝis je okuloj. Ŝi ne plu povis daŭrigi sian laboron en Pola Radio. Post kelka tempo montriĝis, ke la pola oftalmologio ne plu povas ŝin helpi. Ŝi rajtis, kiel civitanino de

Germanio, profiti ĝian sistemon de la sanservo, sed tio postulis translokiĝon al la Federacia Respubliko. Kun la helpo de sia frato Klaus Rauschert, ŝi sukcesis rehejmiĝi en Hamburgo. La longjara kuracado celis defendi ŝin de la komplete blindiĝo, kiu tamen daŭre progresis. Krom Erika, nia tuta familio plu loĝis en Varsovio, sed tio neniel influis ĝian disintegriĝon. La aliĝo de Pollando al Eŭropa Unio estis granda feliĉo, ĝi ebligis facile vojaĝi inter Varsovio kaj Hamburgo. Ni havis hejmojn en ambaŭ urboj. Tien kaj reen daŭris vizitoj, kiujn ĉeestis ankaŭ la nepinoj Klaudia kaj Anna, ambaŭ parolantaj flue la germanan lingvon.



En 2016 Erika vizitis Pollandon, por festi, kiel kutime, sian naskiĝdatrevenon kun la familio. Malgraŭ la bela aŭgusta vetero, ŝi kondukis malkviete, ĉar la malgranda vundeto sur ŝia femuro, ŝajne bagatela, ne saniĝis. Reveninte al Hamburgo, ŝi tuj suferis eltranĉon de la „vundeto”, kiu evidentiĝis malica kancero. Sekvis longa serio de samtempaj terapioj - kemia kaj radia, kiujn ŝia korpo ne eltenis. Okazis totala ŝtopiĝo de ŝia digesta sistemo kaj necesis alia kirurgia interveno. La 1-an de novembro mi veturis al Hamburgo kaj trovis mian edzinon en la Universitata Kliniko, en la agonia stato. Sed la germana sanservo konfirmis sian renomon. La pacientino, post 45 tagoj de kuracado, forlasis la hospitalon. Baldaŭ oni reaplikis kemiterapion. Meze de 2017, la tomografia

esploro trovis neniujn kancerajn histojn. Granda feliĉo! La resaniĝinta patrino venis oktobre al Varsovio, por festi la oran vivjubielon de sia filo Felikso. Novembre ŝi reaperis, por gratuli la edzon okaze de lia 80-jariĝo. La festeno okazis en Dom Chłopa. Decembre ŝi alflugis la trian fojon, por ĝui kun la familio la Kristnaskon kaj adiaŭi la fortunajn jaron 2017.

La feliĉa resaniĝo daŭris preskaŭ unu jaron. Meze de 2018, nova tumoro atakis pulmojn. Komenciĝis serio de la turmenta kemiterapio. La grandan parton de tiu jaro mi pasigis en Hamburgo. Ankaŭ Erika sukcesis, eĉ trifoje, viziti Varsovion. La Silvestran „balon” ni ĝuis tute solaj, profitante la donacon de nia japana amiko Jasuo Tabuchi. Tio estis videodisko kun la 9-a Simfonio de Beethoven, grandioze plenumita fare de la kelkcentpersona orkestro kaj dekmil kantistoj. En marto 2019, Erika venis festi la 50-jariĝon de sia filino Ewa. Ŝi jam konsciis, ke proksimiĝas la tempo adiaŭi siajn polajn geamikojn, ĉar la kancero atakis ŝian cerbon. Ŝiaj kuracistoj en Hamburgo faris ĉion eblan, por subteni ŝian vivon, sed fine de 2019 aplikis al ŝi la paliativan prizorgon, kiun eŭfemisme oni nomas „sekurigo de vivkomforto”. Ĝi estis fakte suspendo de la kuracado. Mi estis konstante kun la edzino, Ewa kaj Feliks venadis, laŭ siaj ebloj, al la patrino. Ŝi daŭre malfortiĝis, ĉiam pli malfacile parolis, miksante lingvojn. En la lasta vivofazo Erika uzis nur Esperanton, kiel la plej facile prononcebla. La 4-an de marto 2020, mia amata edzino, tenante mian manon, estingiĝis, sendolore, kun la serena vizaĝo.

Dum la 77-jara vivo de Erika, 53 jaroj daŭris nia geedzeco, dum kiuj ŝi amis kaj estis amata, ĉiam ŝi serĉis bonajn flankojn de la vivo, ne plendis kontraŭ malfacilaĵoj, sed klopodis venki ilin; estis helpema, kuraĝa, bone organizita, multe lernis kaj legis; ĉirkaŭis ŝin ĝojo laŭ la principo: Tago sen rido estas la tago perdita. Sian longan malsanon ŝi agnoskis kiel alian formon de sia vivo, dum kiu oni ankaŭ povas esti feliĉa, ĝuante la arton esti kune. Mia amata Erika forpasis en Hamburgo, sed pli frue ŝi esprimis sian volon ripozi eterne en Varsovio.



Pri Primaso de la jarmilo en la tempo de lia beatigo

La sepan de junio ĉi-jare, laŭ plane devus okazi en Varsovio, sur la Piłsudski-Placo, la solena beatigo de la Kardinalo Stefano Wyszyński. Okaze de tiu eksterordinara evento, indas alprokismigi al ĉiuj, lian personon, liajn pensojn kaj lian lokon en la pola historio. La Kardinalo Stefano Wyszyński, eminenta granda polo kaj batalanto por homaj rajtoj, estas nomata “Primaso de Jarmilo”.

Tempo de infanaĝo

Ĉio komencis en la vilaĝo Zuzela, situanta ĉe la rivero Bug, ĉe la limo inter Mazovio kaj Podlaĥio. Stefano Wyszyński naskiĝis la 3-an de aŭgusto 1901, en multinfana familio de orgenisto - Stanisław Wyszyński. Samtage li estis baptita en la loka paroĥa preĝejo, kiu apartenas al diocezo de Łomża. Nuntempe, en la malnova lernejo de Zuzela, funkcias “Muzeo pri Infanaj jaroj de la Primaso de Jarmilo”. Ĝi estas celo de multaj pilgrimoj kaj ekskursoj. En Zuzela ni povas ankaŭ aŭdi la primasan sonorilon kaj vidi bronzan monumenton al Li. En 1910, la familio de la Primaso translokiĝis al Andrzejewo (proksime al Zambrów kaj Ostrów Mazowiecka). Tie, en 1911, Stefano ricevis la unuan sanktan komunian kaj en 1913 li estis konfirmaciita.

Busto de Primaso Stefano Wyszyński, kreita de la juna kaj fama skulptisto Michał Selerowski, prezentita dum la ekspozicio de liaj verkoj, en la Galerio “Labirinto” en Zambrów (februaro – marto 2020).

Sur la paroĥa tombejo en Andrzejewo troviĝas tombo de lia patrino Julianna, kiu mortis en 1910. Pro la naskiĝloko proksime al Łomża, kie Stefano pasigis sian infanaĝon, oni nomas lin „filo de la Łomża-regiono”.



“La plej granda saĝo estas povi kunigi homojn, ne dividi ilin”.



Kiamaniere Stefano Wyszyński instruis polojn per vortoj kaj agoj? Li estis ordinita kiel pastro la 3-an de aŭgusto 1924, en Włocławek. En 1929, li ricevis stipendion por studvojaĝo tra Eŭropo. Li vizitis universitatajn esplorcentrojn - en Aŭstrio, Italio, Francio, Belgio, Nederlando kaj Germanio. Dum la Varsovia Ribelo (1944) li servis kiel kapelano en la sekreta hospitalo por malsanaj ribelantoj en Laski, apud Varsovio. Post la dua mondmilito, en 1946, Stefano Wyszyński estis elektita episkopo en Lublin. Li metis en sia episkopa blazono vortojn „Soli Deo” (esperante „Al Unusola Dio”). Li estis Primaso de Pollando dum la jaroj 1948-1981, ĝis sia morto.

Vitrilo, prezentanta Primason de Jarmilo en Preĝejo al la Sankta Spirito en Zambrów, en la renovigita Kapelo de Dipatrino de Paco, kun kopio de la bildo el Stoczek Warmiński.

La papo Pio la 12-a, en 1952, nomumis lin kardinalo de la romkatolika eklezio. La plej konataj eventoj de la primasa vivo estas ligitaj kun lia malliberigo, kadre de komunistaj reprezaliaj agoj kontraŭ la katolika

eklezio. La Primaso estis izolita en Rywałd, Stoczek Klasztorny, Prudnik kaj Komańcza. Dum la malliberigo, li preparis tekston de la preĝo „La Helmontaj Votoj de la Pola Nacio”. (Helmonto – loko de la plej fama monahejo en Pollando en Częstochowa) La votoj rilatas al la pola historio kaj estis verkitaj dum la tricenta datreveno de „Lvovaj Votoj” de la pola reĝo Johano la dua Kazimiro Vaza (1656-1956).

La helmontaj votoj estis prezentitaj dum la eksterordinara meso, la 26-an de aŭgusto 1956, en la monahejo Jasna Góra (Hela Monto) en Częstochowa. Multnombre venintaj homoj ripetis: “Reĝino de Pollando, ni

promesas!". Sur trono de la Primaso kuŝis nur blankaj kaj ruĝaj floroj, ĉar la kardinalo Wyszyński tiutempe estis izolita en Komańcza.

Li ankaŭ estis aŭtoro kaj iniciatinto de la "Granda Jarmila Preĝo" por la festado de la jarmila datreveno de la bapto de Pollando (1966). Historiaj kaj bravaj en la socialisma tempo estis ankaŭ la vortoj "Non possumus" ("Ni ne povas") en la letero de la Pola Episkopa Konferenco al la registaro, esprimanta opozicion al malobservo de la interkonsentoj inter eklezio kaj ŝtato.

Primaso kaj Papo

Antaŭ okuloj de ĉiuj poloj estas la sceno, kiu okazis en Romo, dum la solena omaĝo al la nova papo, Johano Paŭlo la 2-a. La Primaso Stefano Wyszyński, sur genuoj, kisas manon de la nova papo. Tiu evento el 1978 estas eternigita per monumento sur la kortego de la Katolika Univeristato en Lublin kaj per simila monumento en Prudnik. La Papo Johano Paŭlo la 2-a ĉiam substrekadis rolon de la Primaso por sia papeco. Nun ili ambaŭ havas komunan muzeon, kiu situas en la ringo, ĉirkaŭanta la kupolon de la Templo de Dia Providenco en Varsovio.



"La vivo estas pli grava ol legendoj, ĉar en la vivo estas vero"

La Primaso instruis polojn ankaŭ per vortoj - "*La vivon oni devas travivi digne, ĉar ĝi estas nur unu*". Stefano Wyszyński mortis la 28-an de majo, 1981, en Varsovio. La funebra meso estis celebrita sur la Piłsudski placo - iama *Venkoplaco*, en Varsovio. La Primaso estas entombigita en la varsovia Katedralo al Sankta Johano Baptisto, en la kvartalo Malnova Urbo. Post 39 jaroj, sur la sama placo, la 7-an de junio 2020, oni planis okazigi ia beatigo..

La memoro pri la Primaso ne nur en arto...

Kiel memorigas al ni la Primasa Instituto, li povis kliniĝi super ĉiu floro. Li diris, ke li laŭdis la Eternulon ĉiun horon. Li povis rekoni la birdospeciojn laŭ ilia kantado. Li diris pri naturo, ke ĝi estas la plej bela universitato.

La formoj de memorigo de la Granda Primaso estas pluraj kaj diversaj. Nuntempe la nomon de la Primaso portas multaj stratoj, placoj, loĝkvartaloj, lernejoj, malsanulejoj. Nun oni ankaŭ povas legi lian plenan biografion kaj rigardi ĉirkaŭ dek dokumantajn filmojn pri li. Ekde la 1-an de oktobro 1999, en Varsovio agas Universitato je la nomo Kardinalo Stefan Wyszyński (antaŭe Akademio de Katolika Teologio). Biografia muzeo de la Papo Johano Paŭlo la 2-a kaj la Kardinalo Stefano Wyszyński estas kreita en Wilanów, en la Templo de Dia Providenco. La muzea ekspozicio prezentas periodon de 1901 (la jaro de naskiĝo de Stefan Wyszyński) ĝis 2005 (la morto de Johano Paŭlo la 2-a). La ekspozicio montras la influon de ambaŭ herooj al sorto de la pola eklezio kaj la tuta lando.

La memoro pri la Primaso vivas ankaŭ en arto. La 6-an de junio 2001, la Nacia Banko de Pollando enkondukis oran moneron memorfestanta la 100-an datrevenon de lia naskiĝo. Krome, en la sama jaro, la Nacia Banko de Pollando eldonis arĝentan moneron, por monkolektistoj, kun vizaĝo de la Primaso. Menciindas, ke Poczta Polska, en 1992 kaj en 2001, eldonis du poŝtmarkojn kun lia bildo, projektita de Maciej Jędrzyk (kune kun la koverto FDC).

Konklude ni ripetu vortojn de la Primaso de Jarmilo: „*Homoj diras: la tempo estas mono. Kaj mi diras al vi: la tempo estas amo*”. Ni memoru tiujn gravajn vortojn, sed ne nur dum la jaro de lia beatigo.

Aŭtoro de du unuaj fotoj: Paweł Dzienis

Lingvosciencia angulo

Plena Manlibro de Esperanta Gramatiko

Rolvortetoj “*De*” - *De* rilate al aga O-vorto

Subjekto aŭ objekto

De-esprimo, kiu priskribas agan O-vorton, normale montras la sencan subjekton (la aganton) aŭ la sencan objekton de la ago:

- ***La kanto de la birdoj estas agrabla.*** La birdoj kantas. *De* montras subjekton.

- *Du ekbriloj de fulmo* trakuris tra la malluma ĉielo. Fulmo ekbrilis. De montras subjekton.
- *Mi ne scias la lingvon hispanan, sed per helpo de vortaro hispana-germana mi tamen komprenis iom vian leteron.* Vortaro hispana-germana helpis. De montras subjekton.
- *Li tuj faris, kion mi volis, kaj mi dankis lin por la tuja plenumo de mia deziro.* Li plenumis mian deziron. De montras objekton.
- *Vortoj kunmetitaj estas kreataj per simpla kunligado de vortoj.* Oni kunligas vortojn. De montras objekton.
- *Multe da homoj ne faras malbonon pro timo de mallaŭdo kaj agas bone pro deziro de laŭdo.* Ili timas mallaŭdon, kaj deziras laŭdon. De montras objektojn.

De povas do montri jen sencan subjekton, jen sencan objekton. Normale la signifo estas tute klara el la kunteksto, sed kiam povas esti konfuzo, oni povas uzi diversajn rimedojn por eviti miskomprenon.

Por certigi, ke temas pri **senca subjekto**, oni povas uzi *fare de*:

- *Hodiaŭ posttagmeze okazos akcepto fare de la urbestro.* La urbestro akceptos iun.

- *Okazis vizito al nia klubo fare de eksterlandaj gastoj.*

Iuj mallongigas *fare de* al **far**.

Por certigi, ke temas pri **senca objekto**, Zamenhof iafoje anstataŭ *de* uzis N-finaĵon:

- *La Ligo internacia de Esperantistoj havas la celon zorgadi pri la disvastigado kaj enkondukado en la tuta mondo unu neŭtralan lingvon.* Ĝi disvastigu kaj enkonduku unu neŭtralan lingvon.

- *Tre grava por la progresado de l' lingvo internacia estas diligenta uzado ĝin en korespondado.* Oni diligente uzu ĝin.

Sed tiun tute logikan solvon oni apenaŭ plu uzas. Anstataŭe oni preferas trovi ian taŭgan rolvorteton:

aboni gazeton → abonado **al gazeto**

admoni iun → admonado **al iu**

ami iun → amo **al iu**

demandi iun → demando **al iu**

ŝirmi ion → ŝirmo **al io**

taksi ion → taksado **pri io**

deklari ion → deklaro **pri io**

moki iun → mokado **je iu**

penetri ion → penetro **en ion**

Kompreneble oni ne hezitu uzi *de*, kiam ne estas risko de malklareco. Rilate al aga O-vorto *de* estas la normala rolmontrilo kaj por subjekto, kaj por objekto.

Aliaj signifoj

Rilate al aga O-vorto, *de* povas montri ankaŭ formoviĝon, malsimilecon, distingon, komencan tempopunkton k.t.p. (same kiel *de* rilate al verbo):

- *Lia fuĝo de la malamikoj estis kuraĝa ago.*
- *Mia vojaĝo de Parizo al Londono estis tre laciga.*
- *La dioj destinas tre multajn konfuzojn kaj por li preparas skuantan*

transiron de ĝoj' al doloro.

Iafoje eblas konfuzo kun subjekta aŭ objekta *de*. Tiam oni uzu ian rimedon por klarigi la signifon:

- ***Distingado de bono disde malbono ne ĉiam estas facila afero.*** La unua *de* montras objekton. Se oni uzus *de* ankaŭ antaŭ *malbono*, la signifo fariĝus tre malklara.

- ***Post la falo de la tegmento li estas handikapita.*** Oni normale komprenus, ke falis la tegmento (subjekta *de*). Se la signifo estu, ke li falis de la tegmento (formova *de*), oni povus uzi *disde*: ***Post la falo disde la tegmento...*** Plej klara kaj preferinda estas tamen: ***Post sia falo de la tegmento li estas handikapita.*** Tiam *sia* montras la sencan subjekton, kaj *de* nur povas montri formovon.

Ĉe aga O-vorto, *de* povas montri ankaŭ apartenon (kiel ĉe ne-agaj O-vortoj), se la kunteksto permesas:

- ***Ni ĉerpu kuraĝon kaj forton por la laboroj de la jaro venonta.*** = *...la laboroj, kiuj apartenas al la jaro venonta.* = *...kiuj okazos en la jaro venonta.*

Literaturaĵoj

Ni publikigas la rakonton: "Anna en Afriko", premiitan (La dua premio) en la Bjalistoka literatura konkurso - „Esperanto ligas homojn" - Mi estas civitano de la mondo" - 2019, en ĝia originala formo sen korektoj de la Redakcio.

Cecylia Hlebowicz

Anna en Afriko

Kiel studentino ŝi laboris por riĉa, germana familio, samtempe lernante la germanan lingvon kaj zorgante pri infanoj. Ili estis tre senperaj en kontaktoj kaj malgranda Kris jam la unuan tagon neatendante eniris la banĉambron, kie ŝi purigis dentojn post la tagmanĝo. Starante apud ŝi

neatendante fermis la kranon por ĉesi fluon de akvo. Li nenion diris sed ŝi ekkomprenis: ŝparu akvon!

Oni elŝaltadis kutime kromajn bulbojn, la posedanto de tempo al tempo mem alportis manĝaĵon el la fridujo al senhejmuloj, oni dividis rubaĵojn je 6 rubuojj...

Anna naskiĝis en pola vilaĝo. Danke al propra obstineco ŝi iĝis sendependa kaj probable pro tio ŝi ne kritikis Germanojn lernante de ili ĉiutage ion novan.

Doktoro D. estis specialisto pri epidemioj kaj ofte forvojaĝadis eksterlanden por partopreni konferencojn aŭ kune kun humanitaraj organizoj al Afriko. Tiu ĉi kontinento estis objekto de lia speciala zorgo: profesia kaj privata. Iam Anna havis okazon aŭskulti viglajn diskutojn de gastoj kaj helpante al la edzino de la Doktoro ŝi samtempe provis ekkompreni pri kio temis.

Post la vizito de la Doktoro en Suda Afriko liaj manoj tremis kiam li emocie rakontis pri sia renkontiĝo kun Nelson Mandela. Afrika politikisto opiniis, ke en lia lando problemoj aidoso iĝis tiel grandaj ke ilia grandeco permesas diri pri genocido. Ilia ministro pri sano anstataŭ organizi modernan helpon por milionoj da malsanuloj proponis batalii kun aidoso per olivo, ajlo, beto kaj citrona suko...

Anna partoprenis la UK-on en Kopenhago kaj aŭskultis jam la prelegon de kuracisto el Ĉilio pri 2 milionoj da afrikaj orfoj - posteuloj de homoj mortintaj je aidoso. La bildoj, kiujn ŝi tiam spektis, terurigis ŝin ne nur pro malnatura malgraso de infanoj sed ankaŭ pro iliaj ŝancoj je vivo kaj travivo.

En la jaro 2011 "nur" 1,7 milionoj da afrikanoj mortis pro aidoso kaj "nur" 2,5 milionoj aktuale batalis kontraŭ la viruso. La Doktoro substrekis, ke tiuj ĉi statistikoj daŭre estas koŝmaraj sed ... la rezultoj okazas eĉ je 25 procentoj pli bona ol komence de la nova jarcento. Hodiaŭ en Suda Afriko nur en 2 procentoj malsanaj patrinoj transdonas viruson de HIV al siaj infanoj.

En la mondo vivas 2,6 milionoj infanoj malpli ol 15-jaraĝaj, kiuj jam estas infektitaj per la viruso HIV. Nur unu el tri estas kuracata – informas UNICEF kaj alarmas, ke dum la venonta 15 jaroj la nombro de mortoj pro HIV en tiu ĉi grupo kreskis trifoje.

Aidoso estas la dua en la mondo, kaj en Afriko la ĉefa kaŭzo de morto inter adoleskantoj. Tiu ĉi grupo estas ankaŭ unusola socia grupo en la mondo, en kiu indikilo de morto pro la viruso HIV ne malkreskas.

Datumoj de UNICEF montras, ke nuntempe inter adoleskuloj (personoj en aĝo 15-19 jaroj) ĉiu horo 26 novaj personoj iĝas infektitaj. La problemoj

estas tute alia ol en Eŭropo pro alia sinteno al seksumado, akcepto de frua komenco de intimaj rilatoj, perfoto de virinoj, multaj partneroj dum mallonga periodo... En Afriko homoj malvolonte akceptas testojn je HIV. Ili ne volas kontroli sian sanstaton, ili ne volas kuraci sin. Ili forpuŝas el sia konscio informon, ke li povas esti infektitaj aŭ tute ne pensas pri insidanta danĝero.



La efikan batalon kontraŭ aidsoso malebligas ankaŭ kultivado de pratempajn afrikajn kutimojn, kiel: poligamio, heredaĵo de vidvinoj (virino post la morto de edzo, eĉ se li mortis je aidsoso, iĝas edzino de iu el liaj fratoj aŭ kuzoj), ektranĉado de haŭto de la antaŭbrako ĉe ĉiuj familianoj kiel signo de „komuna sango” aŭ razado de kapo por montri funebbron. Oni faras tion ĉiam per la sama, unusola en la komunumo raziloklingo.

Post 2 jaroj, kiam Anna finis la studadon ĉe la Universitato en Kolonio, Doktoro D. demandis ŝin pri ŝiaj vivplanoj. En tiu tempo ŝi jam estis traktata kiel membro de la familio.

„Mi decidis vojaĝi al Afriko kaj labori tie en orfejo – knabino anoncis tion al konsterniĝintaj hejmuloj. „Mi scias, ke mi ne povas ŝanĝi la tutan mondon sed mi povas ŝanĝi la tutan mondon de pluraj infanoj. Pola Fondaĵo por Afriko komencis en Kameruno konstruadon de la Domo por Orfoj.

Laŭplane ekloĝos tie 20-30 knabinoj kaj la orfejon gvidos konataj al mi polaj fratinoj de Dia Providenco. Ili estas polaj misiistinoj laborantaj jam en Kameruno. Dum mia lasta vizito ĉe miaj gepatroj gastigis min ankaŭ aliaj fratinoj en ilia monaĥejo en mia familia vilaĝo. Oni rakontis al mi pri la vivo de orfoj en Kameruno kaj mi estis ege kortuŝita per iliaj rakontoj. Kiel laika persono mi deziras helpi al ili tiom longe ĝis kiam mi pritaksos la aferon eblan.

La fratinoj rakontis i.a., ke jam dum jaroj ili aĉetas por la plej malriĉaj orfoj manĝaĵon, vestojn, sapon, de tempo al tempo dolĉaĵojn. Kiam infanoj estas malsanaj fratinoj kuracas ilin senpage. Okazis tamen, ke orfoj daŭre nenion havas. Kion ricevadis orfoj – zorgantoj forprenis. Infanoj ricevis dentobrustojn kaj dentopaston. Kiam oni demandas: „Ĉu vi purigas dentojn?” infanoj respondas: „Onkloj forprenis ĉion”. Kiam oni demandas: „Ĉu vi manĝis rizon?” la respondo estis : „Ne, ĉar la onklino ne kuiris”. Tiam la monaĥejo prenis decidon konstrui la orfejon.

En la konstruaĵo estas planataj 10 ĉambroj, la kuirejo, la lavejo, la komuna ĉambro por lernado kaj la kudrista metiejo. Ankaŭ la kuranta akvo



kaj elektro! Laŭ la lokaj kondiĉoj ĉio estos vere luksa afero. Infanoj povos vivi tie kiel en normala familio helpante pri hejmaj taskoj, eĉ invitante viziti siajn geamikojn – rakontis fratino Celestyna.

Dum la koncerto "Helpo sonas bone" la 7-an de junio 2019r. en la radioelsendo de Romana Bobrowska de Radio Krakovo oni instigis homojn finance subteni la iniciaton de fratinoj. „Oni rakontis al mi ke la

financaj enpagoj estis mirinde altaj kaj danke al tio fratinoj sukcese realigis multon el siaj planoj – diris Anna. Mi estas laborema. Mi scipovas kudri, kuiri, purigi... Kun miaj gepatroj mi laboris en la ĝardeno kaj en la kampo do, mi ne timas, ke fizika laboro okazos tro peza por mi. Facile mi ligas kontaktojn kun infanoj”.

En Pollando jam en la jaro 2009 oni kreis la Fondaĵon „Infanoj de Afriko”, kies celo estas gvidi specialajn helprogramojn. Ĉiu loko, kiun subtenas la Fondaĵo, estis komence persone vizitata de reprezentantoj aŭ volontuloj de la Fondaĵo. Ĝiaj reprezentantoj estas en konstanta kontakto kun polaj misiistoj, kiuj gvidas diversajn helplokojn, edukobjektojn, malsanulejojn. Danke al tio realaj problemoj de lokanoj estas konataj. Helpe de la Fondaĵo „Infanoj de Afriko” oni povas nutrii, helpi en edukado, sanigi malriĉajn kaj orfajn infanojn kaj doni al ili iomete da ĝojo.

Ĉu vi aŭdis pri la e-vendejeto de misiistoj? Ĝi ofertas lokajn, afrikajn varojn. Ĝiaj klientoj povas aĉeti por infanoj en Afriko bezonatajn de ili

produktojn (ekz. pulvorigitan lakton, lankovrilon, ŝuetojn, plumujon).

Doktoro D. longe babilis kun Anna sugestante al ŝi vakcinadojn kadre de preparoj por la vojaĝo. Li promesis ankaŭ subteni finance la iniciaton de la Pola Fondaĵo por Afriko.

Ĝuste tiun ĉi tagon Anna eksciis, ke la polino Magdalena Adamoviĉ estis elektita kiel la estro de la delegacio de Eŭropa Parlamento por rilatoj kun Suda Afriko. Kun ĝojo ŝi anoncis tion al Doktoro D. traktante la novaĵon kiel bonan signo de la ĉielo.

Ŝi ekplanis antaŭ la forveturo al Afriko viziti siajn gepatrojn kaj persone informi ilin pri ŝia venonta loko de restado. Espereble ili prenos la decidon kun kompreno! La patrino – malkomplika virino – ofte ripetadis, ke Dio difinas ĉies rolon en la vivo. Eble la rolo de Anna estos helpo al tiuj la plej malfortaj Mondaj Civitanoj.

Roman Dobrzyński

Epigramoj

Dum mia longa esperantista vivo mi verkis multe da epigramoj. Sed mi malmulte tradukis, ĉar mi konstatis, ke la tradukado estas treege malfacila tasko. Por tion pruvi, mi petis la redaktoron de Pola Esperantisto publikigi ambaŭ versiojn. Mia deziro estas, ke Vi, Karaj Legantoj, unue legu la Esperantan version de ĉiu epigramo, pripensu ĝin, kaj nur poste kontrolu la polan originalon. Eble Vi serĉos kaj trovos alian traduk-eblecon. Do, bonvolu ekzerci:

Popolo tranĉos manojn...

Popolo tranĉos manojn, kiuj ĝin defendos;
Nomojn de siaj herooj la popol' ofendos...
Post batal', post bruo, post disputoj ardaĵ
Heredaĵon prenos hometoj hazardaĵ.

Ręce za lud walczące...

Ręce, za lud walczące, sam lud poobcina;
Imiona, miłe ludowi – lud pozapomina...
Wszystko przejdzie! Po huku, po szumie, po trudzie
Wezmą dziedzictwo cisi, ciemni, mali ludzie.

Adam Mickiewicz

Ĉio fluas

Ĉio fluas senripete,
Sen komenco kaj sen fino.
Ni naskiĝis pardonpete
Kaj forpasos sen rutino.

Esperanto

Miloj da lingvoj en la mondo!
Granda da folioj kvanto!
En unu arbon ilin ligis
Doktoro Esperanto.

Kafo

En Malto mi gustumis kafon.
Aĉan trinkaĵon de turka fuŝo!
Ĝi ne malpurigu
La kristanan buŝon!

Kun la vivantoj...

Kun la vivantoj iru plu
Al nova vivetapo,
Anstataŭ stagni kun la laŭr'
Velkanta sur la kapo.

Al belulinoj

Ne gravus belaj vizaĝoj,
Nek graciaj figuroj,
Se vi ne havus "tion"
Inter la femuroj.

Nic dwa razy...

Nic dwa razy się nie zdarza
I dlatego z tej przyczyny
Zrodziliśmy się bez strachu
I pomrzemy bez rutyny.

Wisława Szymborska

Esperantyŝci

Tysiąc mów na świecie
Jak tysiące liści.
W jedno drzewo je łączą.
Kto? Esperantyŝci.

Jan Izidor Sztaudynger

Kawa

W Malcie-śmy, pomnę, kosztowali kafy
Trunku dla Turków... Ale tak szkaradny
Napój, co żadnej śliny nie puszcza za zęby,
Niech chrześcijańskiej nie plugawi gęby...

Jan Andrzej Morsztyn

Z żywymi naprzód iść...

Trzeba z żywymi naprzód iść,
Po życie sięgać nowe,
A nie w uwiędłych laurów liść,
Z uporem stroić głowę.

Adam Asnyk

Smaczny kąsek

Co po pięknej twarzy,
Co po pięknym oku,
Gdybyście nie miały
Owej rzeczy w kroku.

Daniel Naborowski

Andreo Bach

Nekredeble, ni povas funkcii sen tio

Ĉiu bone scias, en kiu stranga situacio homoj, preskaŭ en la tuta mondo, nun devas vivi. La tagoj pasas, kaj ni kolektas novajn spertojn, ni ŝanĝas niajn ĝisnunajn kondutojn kaj kutimojn, ni ĉiam pli aprecas preskaŭ ĉion, kio estis ebla antaŭ tiu nuna, stranga tempo.



Tiu ĉi tempo komenciĝis per timetoj, ke povos manki nutraĵo. Do, homoj faris rezervojn. Malgraŭ ĉio, ĝis nun nenio mankas en vendejoj. Pro diversaj limigoj, homoj butikumas multe pli malofte kaj ne estas problemo aĉeti ĉion sen la neceso stari en longa vico de klientoj. Varoj sufiĉas, homoj estas trankvilaj kaj danke al malpli ofta

aĉetado ĉiuj ŝparas multe da tempo kaj benzino por aŭtomobiloj. Cetere, neatendite montriĝis, ke benzino kaj dizeloleo estas multe malplikostaj.

Montriĝas ankaŭ, ke la ĉiutaga aĉetado tute ne estas necesa, kvankam glaciŝrankoj kaj frostujoj pro tio iom pli laciĝas. Multaj vendejoj nun povas labori pli malmulte kaj fermiĝas ofte pli frue ol iam. Kiam klientoj aĉetas malpli ofte, ili aĉetas pli multe ĉiufoje. Multaj homoj rezignis pri ĉiutaga vizitado de sia ŝatata bakejo - ili aĉetas panon por kelkaj laŭvicaj tagoj, frostigas panbulojn kaj vivas kiel antaŭe.

Pluraj firmaoj ebligis al siaj laboristoj labori hejme. Ĉi-kaze tiuj firmaoj ŝparas monon, ĉar se komputilo de laboristo staras en la privata loĝejo, ili ne devas pagi la uzon de energio pro tio kaj, krome, pro la uzo de kafaparatoj, volonte uzataj dum laborhoroj. Laboristoj ne devas translokiĝi ĉiutage al sia



laborloko. Pro diversaj organizaj kialoj kaj por limigi internan interkomunikadon, firmaoj ofte mallongigis la labortempon de siaj dungitoj. Montriĝis, ke plej ofte firmaoj funkcias preskaŭ normale, malgraŭ tio, ke la labora tago ne estas plendimensia.

Homoj strange scipovas adaptiĝi al ĉiu situacio. Rezulte de malfacilaĵoj aŭ danĝero, oni scipovas rezigni pri multaj alkutimiĝoj, okupoj aŭ plezuroj, elektante nur tion, kio vere estas necesa kaj utila. Homoj estas pretaj ŝpari kaj eĉ malpli multe manĝas. Perdante eĉ parton de sia libereco, homoj komencas rimarki valorojn ĝis nun por ili nevideblaj, valorigi tion, kio pli frue estis io tute normala. Aliflanke, ricevinte pli multe da libera tempo, homoj ĝojas kaj ĝuas la tempon, pasigas liberajn momentojn kiel eble plej utile.

Eble ĝuste nun, dum certa malakcelo, alvenis la tempo, por iom pripensi la pasintecon, reorganizi sian vivon kaj fari planojn por iom nekonata estonteco? Ankaŭ de ni dependas, kiel tiu estonteco aspektos. Ni estu gardemaj kaj, kiel ĉiam, bonaj por la aliaj.

Leterkesto



Elżbieta Karczewska „Esperanto Libraro” fermita

La 11-an de majo Podlaĥia Libraro malfermos sian Ĉefan Libraron kaj kelkajn filiojn (sed ne ĉiujn). Daŭre restos fermitaj la filioj n-ro 1, 10, 11,12, 13, 14 (Esperanto-Libraro") kaj 17. La deka naskiĝtago de la biblioteko "Esperanto-Libraro" de la 12-a de majo povos okazi je Nova Jaro. La torton mi gardos en fridujo. Rigardu filmon pri la libraro: <https://youtu.be/3F8ItXS-4MQ>



Jomart Amzayev, Komune kanti!

Multaj nun sidas hejme memizolitaj kaj atendas pli bonajn tempojn. Kelkaj malsaniĝis. Kelkaj foriris... Esperanto-artistoj ŝatus subteni vin kaj kanti tiun belan kanton "Imagu" (traduko de William Auld). Zorgu pri via sano kaj pri sano de viaj familianoj. Estu fortaj, kedu kaj esperu!

<https://www.facebook.com/Jomka/videos/10217350075647191/UzpfSTM0NzcwODYxNTI2OTk1Mj0zODcxOTcyNzg5NTEwMTY2/> aŭ simple venu al mia retejo en Fejsbuko.

Jen ankoraŭ unu video (poŝtelefona projekto) de nia kreiva grupo. Malgraŭ la pandemio, la printempo venis kaj donis esperon pri la pli bona estonteco. Zorgu pri viaj karuloj. Restu sanaj!

<https://www.facebook.com/Jomka/videos/10217420810015506/>



Katalin Kováts, Pranepino de Ludoviko Zamenhof malsana

Margaret Zaleski-Zamenhof, la pranepino de la Majstro, estas kuracisto en Parizo. Ŝi laboris kaj, bedaŭrinde, malsaniĝis dum la kronviroza pandemio. Katalin Kováts, la redaktoro de edukado.net, intervjuis ŝin la 28-an de marto pri la sindediĉa laboro de kuracistoj en tiu malfacila periodo, pri la situacio en Francio kaj pri ŝia malsaniĝo, simptomoj kaj konsiloj. La intervjuo estas la dua ero de la serio "Kronvirusaj intervjuoj", pretigita por la KLERIGEJO de edukado.net. La 30-an de marto venis bona novaĵo: Margaret resaniĝis kaj fartas bone. Dankon pro viaj bondeziroj al ŝi!!!



Kronviroza intervjuo kun Margaret Zaleski-Zamenhof



Przemysław Wierzbowski, SAT-kongreso 2020 estos enreta

La 93-a Kongreso de Sennacieca Asocio Tutmonda por la unua fojo devis okazi en Pollando ĉi-jare, en la tagoj 25.07–01.08, en Bjalistoko. Pro la epidemio, la organizantoj decidis, ke ĉi-somere ne eblas okazigi la aranĝon surloke. Anstataŭe ni invitas ĉiujn senpage ĉeesti programerojn de la kongreso virtuale; ĉe la retpaĝo de la kongreso: sat.bialystok.pl, baldaŭ aperos detaloj pri reta SAT-kongreso kaj ĝia programo elsendata per interreto.

Al Bjalistoko ni tamen invitas en somero 2021 – tiam la kongreso de SAT okazos en nia urbo, kaj ni festos la 100-jariĝon de Sennacieca Asocio Tutmonda, fondita en 1921.

Esperanto-aranĝoj en Pollando en 2020

Forstrekitaj aranĝoj pro pandemio ne okazis aŭ ne okazos en planata tempo.

14-15 marto 2020	Internacia Ŝako-Turniro en Radom	Turniron organizas Akademio de Ŝakoj, Studenta Klubo "Roszada" kaj Pola Esperanto Asocio Filio en Radom
17-19.04. 2020	Esperanta Printempo en Szczecin 2020 „Kastelo de Pomorjaj Princoj”	Kristoforo – lobacz.k@onet.eu, tel. +48 601 725 335, Irena – irena- tomaszewska@o2.pl, tel. +48 502 327 701
23-28. 05.2020	5-a Interkultura Majrendevuo Wrocław / Dolina Baryczy	Eŭropa Centro de Multkultura Edukado en Wrocław, informado.eo@gmail.com
23-24. 05 2020	8-a Eŭropa Festivalo de Esperantaj Kantoj en Wrocław Okazos oktobre en virtuala formo	Eŭropa Centro de Multkultura Edukado en Wrocław, informado.eo@gmail.com
23.5. 2020	5-a Internacia Simpozio, Wrocław	Eŭropa Centro de Multkultura Edukado en Wrocław, informado.eo@gmail.com
21.06. 2020	Montara Renkonto Czantoria Wielka en Beskidy Montaro	suchanekj@seznam.cz
29.5 – 5.6. 2020	Germana Pola Esperanto Kongreso Fervoista Esperanto Kongreso Frankfurt (O)/ Slubice Okazos en 2021	Pola Esperanto-Asocio Germana Esperanto-Asocio Internacia Fervoista Esperanto Federacio
5-7. 05.2020	Esperantaj Tagoj de Krakovo	Krakova Societo Esperanto
25.07-1. 08.2020	93-a kongreso de Sennacieca Asocio Tutmonda en Bjalistoko Okazos en 2021	Sennacieca Asocio Tutmonda kaj Bjalistoka Esperanto-Societo https://www.facebook.com/events/649411952208990
16.08. 2020	Montara Esperanta ekskurso al la monto Szyndzielnia kaj urbo Szczyrk apud Bielsko-Biała	Filio de Pola Esperanto-Asocio en Bielsko-Biała. Krystyna Zgud karad099@gmail.com

8-18.08. 2020	Kristana Kongreso en Legnica (kadre de 70-a KELI-kongreso)	Silezia Esperanto-Asocio. Kristana Esperantista Ligo Internacia https://keli.sea-vroc.eu/
2-10. 09.2020	53-a Internacia Esperantista-Feriado en Łądek Zdrój	Silezia Esperanto-Asocio Teresa Pomorska, pomer@wp.pl
11-13. 09.2020	"Esperanto sur Strando" en Sopot	Triurba Esperantista Asocio TORENTO torentosopot@wp.pl https://sites.google.com/site/esperantowsopocie/ FB – Esperanto Sopot.pl
18-20. 09. 2020	36-aj Artaj Konfrontoj en Esperanto „Arkones 2020” en Poznań	E-SENCO Kultur-Socia Societo je la nomo Ludoviko Zamenhof en Poznań. http://www.arkones.org/eo/
9-11. 10.2020	44-aj Esperantistaj Preĝtagoj en Częstochowa	Pola sekcio de IKUE pomer@wp.pl
11.2020	Esperantista renkontiĝo GRUPE - 24 en Gliwice	PEA, filio en Gliwice, stanislaw.mandrak@gmail.com aŭ: staman@ka.onet.pl
5-6. 12.2020	5-a Esperanta konkurso "Vortbeleco en Esperanto" en Wrocław	Eŭropa Centro de Interkultura Edukado / informado.eo@gmail.com / Malgosia Komarnicka
11-13. 12. 2020	21-aj Bjalistokaj Zamenhof-Tagoj en Bjalistoko	Bjalistoka Esperanta Societo kontakt@espero.bialystok.pl
12.-01 2020	12-a JES Junulara Esperanta Semajno en ... (?)	Pola Esperanto-Junularo www.pej.pl

Universalaj Kongresoj de UEA

1-8.08. 2020.	La 105-a Universala Kongreso de Esperanto (UK) en Montrealo (Kanado). En 2020 nur okzoz virtuala kongreso UK en tradicia formo okazos en 2022	Universala Esperanto-Asocio uea.org
17-24.07. 2021	La 106-a Universala Kongreso de Esperanto (UK) en Belfasto (Nord-Irlando) Okazos en 2021	Universala Esperanto-Asocio uea.org

Popularaj Esperanto-aranĝoj en najbaraj landoj

01-10.05. 2020	"Mirinda Lviv" en Lviv – Ukrainio	Volodimir Hordijenko, Kijivo volodomir@ukr.net
13-21.07. 2020	43-a SEFT Somera Esperanto Familia/Feria Tendaro en Thomsdorf - Germanio	Vorsitzender Esperanto-Klub Schwerin André Christian Weber, gerd.gallium@mailbox.org
18-26.07. 2020	Somera Esperanto Studado (SES) kaj Somera Esperanto Programado SEP – La dua Esperanta kodummaratono en Kromĉiĝ – Ĉeĥio - okazos virtuale	E@I, Februárová 2, SK-958 01 Partizánske, Slovakio ses@ikso.net
17-20.09. 2020	2-a Eŭropa Civitana Renkontiĝo en Kassel - Germanio Laboratellero "Esperanto kaj Eŭropo" kadre de "Kleriĝo kaj Lingvoj"	w.guenther.esperanto@web.de

Gazetaro pri Esperanto-movado

Paweł Dzienis

Pri Esperanto en la 1-a programo de Pola Radio

Dum la nacia kvaranteno pro pandemio kaj la kampanjo „Restu Hejme”, ni havas ŝancon aŭskulti multajn interesajn programojn per amaskomunikiloj. En la Pola Radio oni povas trovi ankaŭ disaŭdigojn pri Esperanto..

Dufoje Agnieszka Kunikowska gastigis esperantistinon Gabriela Kosiarska, redaktorinon el la Esperanta Pola RetRadio. Mi parolas pri radioelsendoj „Słowoteka” (esperante „Vortoteko”), prezentitaj la 15-an kaj la 22-an de marto 2020. Vi povas aŭskulti ĝin ĉi-tie: <https://www.polskieradio.pl/7/4418>. Redaktorinoj parolis pri historio de Esperanto, vortkreado, senŝanĝaj 16 reguloj kaj disvolviĝo de Esperanto. Por proksimigi al polaj aŭskultantoj sonon de la lingvo kaj E-literaturon, la gasto - invitita esperantistino legis fragmentojn el “La eta Princo” de Antoine de Saint-Exupéry (libro kelkfoje tradukita al Esperanto). Bone, ke ĉi-tiu populariga materialo estis kreita kaj prezentita ĝuste en la Pola Radio.



Danke al la Radio, oni povis ankaŭ ekkoni homojn, gravaj por Esperantujo. La 25-an de marto 2020, eblis aŭskulti la disaŭdigon „Eureka”, kiu rememorigis personon, ligitan kun Esperanto. La titolo de ĉi-tiu elsendo estis “Kazimiera Bujwid, neŝancelebla aktivulino por la virinaj rajtoj”. Kazimiera Bujwid (1867 - 1932) estis edzino de la elstara pola bakteriologo kaj aktiva esperantisto - profesoro Odo Bujwid (1857 - 1942). Ilia geedzeco estis specifa interkonsento de animoj kaj koroj. La edzino estis estrino en la Fabriko de Serumoj kaj Vakcinoj, fondita de ŝia edzo en Krakovo. Dum la 1-a mondmilito, ŝi kaj ŝiaj filinoj administris malsanulejon por la soldatoj de Polaj Legioj. K. Bujwid estis ankaŭ gvidantino de la batalo por la edukrajtoj de virinoj. Ŝi iniciatis redaktadon kaj amasan sendadon de individuaj kaj kolektivaj leteroj pri studrajto de virinoj. Tiu agado rezultigis ekaperon de la unuaj studentinoj en la Jagelona Universitato, en 1896.

Dum pluraj jaroj Odo Bujwid eldonadis la revuon „Pola Esperantisto”. Kazimiera estis fidela helpantino ankaŭ en Esperantaj laboroj de ŝia edzo. Bedaŭrinde, en la disaŭdigo mankis informoj pri tio.

Odo kaj Kazimiera Bujwid, en la jaro 1921, engaĝiĝis en renovigon de la reĝa kastelo Wawel en Krakovo. Ilia agado estis memorigita per la memorbriko, enmasonita en muro de la kastelo. En ilia domo, ĉe la strato Lubicz 34 en Krakovo, kie funkciis ilia fama Fabriko, nun estas privata „Muzeo de Odo kaj Kazimiera Bujwid”.

Mi pensas, ke la karaktero de la heroino de ĉi-tiu disaŭdigo plej bone estas respegulita en ŝiaj propraj vortoj :

„Mi vivas - ĉar mi volas vivi, sed neniam, ĉar mi devas kaj mi vivas, kiel mi volas, neniam tiel, kiel mi devas!”

Agrablan aŭskultadon! Ligilo al ĉi tiu radia disaŭdigo:

<https://www.polskieradio.pl/7/5098/Artykul/2480778,Kazimiera-Bujwidowa-niezlomna-dzialaczka-na-rzecz-praw-kobiet>

En la interreta kuriero “Kultura enter” aperis interesa pollingva artikolo de Jacek Warda „Esperanto, czyli różnica między porozumieniem a zrozumieniem” („Esperanto - la diferenco inter interkonsento kaj kompreno”)

http://kulturaenter.pl/article/edukacja-dar-esperanto/?fbclid=IwAR0POCGRE4YRDFyh_zDOF95IHq6ygvnK_BBzz4qGSwlb7QupFj7XwWPn7MA

odwiedzane Piensze łroki Zakupy w necie 2020 GPK - Arkusze Go... vortano.net LanguageTool - Spell... Category:Zlot Zimowy... Esperanto Plus...

EN | UK | PL

Strefa wymiany myśli, nie! racji

kultura enter

O NAS WSPÓŁPRACA ARCHIWUM REKLAMA KONTAKT MAGAZYN INTERNETOWY

KULTURA ENTER | ARTICLE | EDUKACJA, DAR ESPERANTO

EDUKACJA. Dar esperanto

Jackek Warda
Esperanto, czyli różnica między porozumieniem a zrozumieniem

Spśród powiedzeń traktujących o języku do moich ulubionych należy: „Gravas akuzativo, pli gravas uzaktivo”, czyli: „[Znajomość] strony bierniej jest ważna, ale używanie [języka] jeszcze ważniejsze” oraz „Elektaĉis sen fino, edziĝis kun porkino” – „Gdy wahasz się zbyt długo, w końcu ożenisz się ze świnią”. Można to powiedzieć też w sposób prostszy, ale za to bardziej uniwersalny: „Czas na podjęcie każdej decyzji jest zawsze skończony”. Zapewne dotyczy to także projektu opisanego na końcu tego tekstu. Język esperanto ma główną również zaletę, że jest neutralny, co oznacza, że nie przynależy do jakiegokolwiek narodu. Stąd nikt z esperantystów nie będzie się śmiał, że mówimy nie tak, że mamy taki, a nie inny akcent. Każdy tak samo musiał się esperanta nauczyć i to, jak dobrze mówi, wynika tylko z tego, ile pracy w naukę włożył, a nie w jakim kraju się urodził. Poza tym łatwo go przyswoić i nie zawiera

2020/02 nr 93-94

SPIS TREŚCI

Mural nawiązujący do esperanto i jego twórcy, Białystok. Fot. Aleksandra Zińczuk.

Miejsce po dawnym domu Ludwika



eventaservo.org

Oni eldonis

Przemysław Wierzbowski

Nova romano, eldonita en Bjalistoko

Komence de 2020 Bjalistoka Esperanto-Societo, kunlabore kun Ars-Libri kaj Libro-Mondo, eldonis la romanon „La blanka kolombino de Kordovo” de la rusa verkistino Dina Rubina. En Esperanton tradukis ĝin Mikaelo Bronŝtejn.

La blanka kolombino de Kordovo (2009) konsistas el la elementoj, distingaj por la tradicia familia sagao (historio de la familio de profesoro-falsisto Kordovin), aventura literaturo



(kun historio pri piratoj) kaj moderna krimromano. Tre malofte prezentas sin en ĉi tiu romano la rakontanto – silenta observanto, ĵonglisto de motivoj, kaŝita demiurgo, kiu en la universo-teatro lerte tiras ŝnuretojn de siaj marionetoj, kiuj ne ĉiam obeas, ofte spiteblas kaj foje-foje obstiniĝas. Tian bildon kompletigas aludoj literaturaj (antaŭ ĉio pri rusaj kaj hispanaj verkoj) kaj pentroartaj (en kies centro rolas El Greco).

Forpasis

La 18-an de februaro 2020 forpasis la blinda, multjara E-samideanino **Zofia Soroka**. La funebra ceremonio okazis en Varsovio, la 25-an de februaro 2020 je la 11:00 en la preĝejo al st. Antoni Padewski, ĉe la str. Senatorska 31. Entombigo okazis sur la Tombejo Bródnowski.

Kun granda malĝojo - filino, Magdalena

La 4-an de marto 2020 en Hamburgo, post longa malsano forpasis esperantistino **Erika Dobrzyński**. La entombigo okazis la 8-an de majo 2020 sur tombejo Marysin Wawerski en Varsovio.

Kun la granda malĝojo - edzo, Roman Dobrzyński

La 31-an de marto 2020 forpasis nia estimata amikino kaj varsovia samideanino **Irena Szanser**. La adiaŭa ceremonio kaj entombigo okazis sur la tombejo Cmentarz Komunalny Północny, sektoro W IX 7 – 8 – 8

Kun bedaŭro, en nomo de lokaj esperantistoj
Alina Mozer



El fotogalerio de Andrzej Sochacki

Andrzej Sochacki

Beskidmontara Turisma Esperanto-Renkontiĝo Bielsko-Biała 22-26.6.1988






Beskidmontara Turisma Esperanto-Renkontigxo, 22-26.06.1988, Foto A. Sochacki.





Pola Retradio en Esperanto
pola-retradio.org



Fotis Adam Wilkus

Esperantistoj antaŭ la renkontiĝo sur la monto Ĉantorio la Granda vizitis karbominejon "Guido" en Zabrze kaj historian radiostacion en Gliwice

Ĉu vi aŭskultas elsendojn de Varsovia Vento - www.podkasto.net/

NIA FOTOGALERIO



La Esperanto-renkontiĝo sur la monto Ĉantorio la Granda
la 16-an de junio 2019

Ĉu vi aŭskultas elsendojn de Varsovia Vento - www.podkasto.net/